

LITERATURA MONDO



MURILLO: JESUO DISDONANTA PANON

•REDAKTA KOMITATO:

JULIO BAGHY, PAULO BALKÁNYI, KARLO BODÓ, KOLOMANO DE KALOCSAY,
PAULO DE LENGYEL, DR^o VINCENTO TÓTH KAJ PAULO VARSÁNYI
RESPONDA REDAKTORO: DR^o BÉLA RÁCZ DE KOVESD L. K.

MAJO 1925

IV. JARO 5. NO.

ELDONAS: HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO BUDAPEST, EÖTVÖS-UTCA 3


NIA KUNLABORANTARO

LOUISE BRIGGS (ARMLEY), J. GRAU CASAS (BARCELONA), HELMI & HILDA DRESEN (TALLINN), NIKOLAO HOHLOV (VARSOVIO), IVAN H. KRESTANOFF (PIRDOP), A. MAZZOLINI (FERMO), JAN VAN SCHOOR (ANTWERPEN), TIBERIO MORARIU (BUCURESTI), PAUL NYLÉN (STOCKHOLM), EMMA L. OSMOND (LONDON), PETRO STOJAN (CHISINAU), M. SOLOVJEV (NOVI SAD), DRO LEONO ZAMENHOF (VARSOVIO), RAYMOND SCHWARTZ (PARIS), J. JURYSTA (CZENSTOCHOVA), STANISLAW BRAUN (LODZ), HENRIKO SEPPIK (TALLINN), DANIEL EYQUEM (PARIS), ZANONI.

KRUCENIGMO III.

Laŭ multaj deziroj jen la pli malfacila kaj komplikita enigmo. Espereble plaĉos ankaŭ ĝia simetrieco. Premioj kie ĉe la unua enigmo. Ĉiuj Esperantaj vortoj estas apostrofitaj (sen gramatika finaĵo).

Horizontale 1 agrabla prin-tempa sono, 3 ni altetaksas ĝin nur kiam ĝi mankas, 5 ne komuna, 7 supertera stato, 9 sur muzikverkoj oni legas, 10 diplomatj uzas, 12 polusvojaĝanto devas havi, 13 lago en Azio, 15 tie okazis la unua beleckonkuro, 16 greka dio, 18 sankta Antonio havis, 19 oni kutimas fieri pri ĝi, 21 akademiano, 22 aĉetanto pri ĝi ĝojas, 24 en teatro oni vidas, 25 verkisto multe bezonas, 26 tre ofta mallongigo, 30 rusa rivero, 32 speco de pafilo, 33 scienculo ofte havas, 35 serba urbo, 37 io por ŝuoj, 38 kartludo, 40 edzino de bizantia imperiestro, 42 monduma vesto, 43 dolĉa suko, sed povas mortigi, 45 itala rivero, 46 ĉefa materialo de farbofabrikoj, 48 gaja kunesto, 49 per ĝi oni riĉiĝas (laŭdire), 51 nuntempe estas epidemio, 52 dua vorto de religia himno, 54 dombesto, 55 malagrabra mieno, 56 arbo, 57 parto de cirklo, 58 lago en Afriko.



Vertikale: 1 danĝero de karnarioj, 2 fiŝo, 3 fino de negoco, 4 virinfiguro de Ibsen, 5 estonton antaŭdiris, 6 mistera lando, 7 monunuo, 8 geologia epoko, 9 savo por soifantoj, 11 religia kutimo, 12 nuntempe virinoj portas mallongajn, 14 biblia figuro, 17 ĝardenisto faras, 18 mallumon ŝatas, 20 plej facila muzikinstrumento, 21 forta veneno, 23 lago en Ameriko, 27 ju pli oni forprenas, des pli ĝi kreskas, 28 manĝaĵo, ankaŭ dio, 29 montra vorto, ankaŭ monspenco, 31 la tula mondo, sed almenaŭ unu persono, 33 fabela besto, 34 ĥemia elemento, 35 la plej kruela poeto, 36 neniu volas vidi sian propran, 38 solena vesto, 39 religia libro, 40 rivero en Azio, 41 pri virinoj gardas, 42 majstro ne faras, 44 mallongigo de malsanomo, 45 speco de voĉo, 47 celo de sipoj, 50 antaŭe rusa urbo, nun ĉefurbo de malgranda lando, 51 rekompenco de bonfaro, 53 ranejo, 54 Azia nacio.

Solvo de la Krucenigmo I. Horizontale: 1 La Faraono, 2 ujo, 3 akordo, 4 ordo, 5 ili, 6 ok, 7 kajo, 8 opalo, 9 sub, 10 ombro, 11 Po, 12 ioujo, 13 ne, 14 paro. Vertikale: 1 li-riko, 4 oro, 11 por, 15 en, 16 lapo, 17 Fujjama, 18 bis,

19 roko, 20 oro, 21 okro, 22 ja, 23 nodo, 24 kubo, 25 o.

Ĝin solvis 29 personoj. Premiitaj. 1 P. Lapiene, Birzai, 2 N. Hohlov, Varsovio, 3 J. Kaczka, Luck.

REDAKTA ANGULO

Nia revuo volas esti renkontejo ne nur de l' ĉiunaciaj literaturoj, sed ankaŭ tiu de l' artoj. Ĝia konstanta rubriko: Arto kaj Artistoj estas kolektejo por la artaj valoraĵoj de ĉiuj popoloj. Per ĉi tiu tendenco ni volas esti fidelaj al la fundamento de nia movado, al ĝia idea enhavo: manifesti per la vicigo de l' ĉiunaciaj artaj valoraĵoj la komuneco de l' homaj idealoj kaj tiel akceli la interkomprenon kaj interfratigon de l' diversaj popoloj.

Ĉi tiun grandan moralan forton de l' arto unuavice ni, E-istoj devas konscii kaj priuzi je la intereso de nia fina celo. Ni volas, ke la arto, ĉi tiu plej bela simbolo de l' homaj sopiroj al la Idealo, ricevu vere sian idealan sencon: kiel internacia lingvo de l' sentoj ĝi kunligu la tutan homaron.

Por ebligi ĉi tiun celon, ni alvokas ĉiujn, kiuj sentas la gravecon de niaj klopodoj, al nobla konkurso kaj ni atendas la helpon de l' tutmonda Esperantistaro.

P. Varsányi.

La rubrikon Arto kaj Artistoj ĝis nun verkis nia redakta komitatano Paŭlo Varsányi. Rekonante la gravecon de lia iniciativo, ni jene malfermas la rubrikon por la tutmonda espistaro. Ni serĉas kunlaborantojn en ĉiuj laŭ arta vivo gravaj landoj de la mondo. Ni esperas, ke fakuloj kaj artsatantoj bone konsideros ĉi tiun peton kaj uzos la okazon: propagandi la arton de sia nacio per nia revuo. Kaj per tio ankaŭ nia revuo atingos sian celon, la veran internaciecon ankaŭ ĉirilate. Speciale ni adresas nian peton al la naciaj esp. aj societoj, kiuj povas instigi siajn anojn al kunlaboro, kaj doni al ili la necesan subtenon. Ilia helpo estas grava precipe pri la akiro de la necesaj klišoj. La resendon de la klišoj ni nepre garantias, krome ni pagas la elspezojn de l' prunto kaj de l' poŝto. Por ke la klišoj ne kuŝu ĉe ni tro longe, plej oportune estas sendi unue la artikolon kun la listo de la klišoj kaj sciigi ankaŭ ilian grandecon. Poste ni sciigos la aŭtoron, kiam ni bezonos la klišojn, kaj por kiuj el ili ni povos doni lokon en la revuo.

Komprenoble la artikoloj povas esti ankaŭ tradukitaj. Ilia longo ne estu pli, ol unu paĝo en nia revuo.

Specialajn pretendojn pri epokoj, skoloj, individuoj ni ne havas, sed klišojn ni nepre bezonas, ĉar bedaŭrinde nia financa situacio provizore ne permesas al ni farigon de klišoj.

Esperante viglan interesigon, tulkore salutas siajn novajn kunlaborantojn
La Redakta Komitato.

NOKTO DE LA TROJA MILITO

JOHN DRINKWATER

PERSONOJ:

PRONAKS } Grekoj
SALVIUS }

ILUS } Trojanoj
KAPIS }

Greka gardisto.
Greka servanto.

La agado pasas inter greka tendo kaj la Troja murego, kaj estas daŭra.

SCENO I.

Greka tendo sur la ebenaĵo antaŭ Trojo, ĉirkaŭ la fino de la dekjara milito. Estas plenstela somera nokto. Pronaks kaj Salvius, du junaj grekaj soldatoj, estas en la tendo, Salvius leganta ĉe lumo de torĉo, Pronaks alrigardanta la nokton. Dum la sceno Gardisto preterpasas de tempo al tempo tien kaj reen malantaŭ la tendo.

PRONAKS:

La nokto hejme ofte estas tia. Mi vidis la fruktejojn blankajn kiuj sub lun' somera brilis, kiel nun Ĉi tendoj sub la steloj. En ĉi horo La arbetar' de mia patro plenas De kanto, dum la dormo regas hejme En la komforta dom'. Escepte se iu karulo maldormante pensas Pri mi kaj miajn ŝancojn nun kalkulas, Dum morto Troja sekvas sian noktan Mision.

(La gardisto preterpasas.)

Kara hejmo estas tiu, Kaj bonodora, kun benata frukto Kaj gren'; kaj pensoj, kiuj faras min Pli aĝa ol juneco mia, venas Eĉ el urtikoj ĉe l'pordego. Eble Hodiaŭ trovas sin la rikoltistoj En kampo, kaj en nokto la matura Florsermo estas disblovita. Estas Jam la rikolto tria nun de tiam Ke ni konsumigadas sur ĉi tiu Senfrukta ebenaĵ', por venĝi ian Maljuston, okazintan dum la tagoj De nia infanec', al belulino De ni eĉ ne vidita. Jaroj tri... Sed tiel estas, kaj tiele devas Ja esti, ĝis la greka jur' pravigos. Salvius, kial estas ĉiu penso Belega nur dolor'?

SALVIUS:

Ni scias Eĉ dum plej alta adorad': forpasas Beleco. Tio estas la tragika Rakonto, tio estas nia mondo.

PRONAKS:

Ĉu ne tre strange estas do ke, kvankam En malliber' nin tenas ĉi malpaco Jam tiel longe, ke memori bone Malgrandan Argiv-straton estas al ni Tortur' ĝisoste, tamen ne ekzistas En sang' malam' al tiuj, kies morto Jam estas nia tagkulim', sed sole Konsent' en mort', sciante ke la morto Same facile povas nian langon Ektrafi, kiel tiujn, kiuj kuŝas Por ĉiam mutiĝinte, ĉar indulgo Ne estas al ni permesata.

SALVIUS:

Strange Ne estas: kiu kun la morto Iradas rigardante ĝian tagan Detruon, kaj je ĉiu mortobato

Pensas pri l'tuta agoni' sendita El tiu bato, kiu iras pulse Batante, pulsbatante, pulsbatante, Tiu forgesas ĉiun malamegon. Mortintojn kiel povus ni malami? Kaj — kie morto regas kiel inter Ni nune — vi, Pronaks, kaj mi, kaj ĉiuj Amikoj, kontraŭuloj niaj estas Egale kiel jam mortintaj homoj.

(La gardisto preterpasas.)

En mond' fantoma kune moviĝantaj, Kun vivo, kiel almuzo sen Bonŝanco ĉe la pordo. Malamegi Afer' ne estas por ni, kiuj flanken Formetis la ŝirmejon; kie homoj Sin pensas senmezure malproksime De eterneco kaj liberigitaj Pasioj havas siajn naskiĝlokojn. Malami povas grandaj reĝoj. Pastroj Eltondri povas sian malamegon, Ĝin grizbarbul-profetoj povas krii Aŭ tiuj, kiuj ehas la malamam Pro fierec' pri sia novtrovita Potenc', timante ke mildemo markus Ilian veran karakteron, kaj Senigus ilin de la bruta gajno. Tiu envio estas ne por ni. Destino nia estas sole morti, Aŭ doni tiun morton, kiun tiuj, Pro sia malameg' aŭ senzorgemo, Deziras.

PRONAKS:

Ne pro malinklin' al devo... Ja estas vere ĝoja ag' plenumi Ordonon de l'patrina lando, kvankam La blind-anim' forgesas la devenon De l'kaŭzo. Mi en mia horo mortos Kun ĝojo, eĉ se hodiaŭ venos ĝi, Kaj sen bedaŭro, tamen por junulo Ja tre maldolĉe estas se, anstataŭ Okupi sin pri vivesplor', pariĝo, Kaj konstruad' de daŭra fam, aŭ meto De la kameno taŭga por amato, Li devas malatenti ĉion ĉi Kaj nur pri morto lerni, kiu devus Kaŝita esti por juneco. Grava Afero atendanta aĝplenecon, Sed ne komuna babilado inter Ĉi lajdoj de la tagbestaĵoj. Tamen, Memori devas mi, por ĉio ĉi Forlasis mi spertplanan mian vivon, Fruktejojn miajn, la riverojn, ankaŭ La sonorilojn de brutar' krepuska Movatajn en nebul'.

SALVIUS:

Mi scias; menso Laciĝas pripensante ilin. Tiuj Malgrandaj hejmbelaĵoj. Mia lito Rigardas okcidenten sur la maron Ionan. Dolĉa, freŝodora ĉambro Ĝi estas. Tie skribis mi plej bonajn Poemojn miajn. Vidi mi ne povas Veleton nun al Troj' venantan, kiu Ne igas mian cerbon sopiregi Je tiu eta ĉambro ĉe la kajo, Sur kiu ridas je tagiĝo kaj dum La tute tag' maristo, ĝis la ŝipoj Dum sunsubir' silenta iras for Al akvoj Siciliaj.

PRONAKS:

Tie viajn Poemojn verkis vi, en Pylos; kaj en Atheno ankaŭ mi revadis, kvankam Mi kaptis ne lirikan kanton. — Mi Prirevise politikon pli honestan, Ol kiun iu regno iam konis: Mi estis alportonta princolandon

Al ĉies hejm'; al ĉiu hom' la scion Ke li mem estras sian propran sorton. La revo nebuliĝis. Jarojn tri Instruis al mi polv' de Trojo sole La preĝon en la nokt' pri dormo, brako Pli forta en ruzec' ol malamika, Okulo pli rapida por deturni La morton lerte. Kaj, Salvius, kio Pri viaj kantoj?

SALVIUS:

Ili dormas jam De multaj tagoj, atendante venon De pli feliĉa tempo, se ĝi venus.

PRONAKS:

Kaj garde staras mort'.

(La gardisto preterpasas.)

...Kaj via kanto.

Kreskinta en uter' generacia Por ĝojo kaj util' de homo, eble Pereos antaŭ ol ĝi evoluos Muziko alta, por ke l'fam' eliru Ke Grekoland' pli sange ol Ilium Militis; Tio estas interŝanĝo Malinda... Sed ĉi pensoj moviĝantaj Fantomsimile el vivaĵo kiu Estadi devus, min malatentigas Pri mia devo. Estas jam post horo En kiu ĉirkaŭflari devus mi La muron Trojan por ekkapti eblan Viktimon kiu venos. Mi cikatrias La muron dum la lastaj noktoj, ĉe l' Kurbiĝ', pri kiu mi parolis, ĝis Sukcesis mi en rompiĝanta ŝtono Piedtenilon fari por atingi La supron. Estas stranga ludo, tiu Subita videtruo en mallumo, Kaj tiu dispecig' de karno, kiu Ankorau estas freŝa en la sango, Kaj kiuj ploras, certe ja, mi pensas, Ploradas kiel tiuj kiuj plorus Se falus mi. — Mi malamegas tion. Sed bonan nokton! Vi ja volus dormi. Malfrue estas, kaj ĉe la tagiĝo Gardvico via sekvos.

(Li prenas armilojn kaj involvas sin en sian surtuton.)

Bonan nokton!

Vi kion legas?

SALVIUS:

Kantojn de poeto Verkitajn en provinco mia. Estas En lia kanto veloj, kaj marbirdoj, Niaj ebenaj paŝtolandoj kaj La bronzumitaj fiŝkaptistoj sur la Flosantaj tajdoj. Lia nomo estis Kreono, tiajn kantojn verkos mi, Se volos tion sorl'.

PRONAKS:

(kui enverŝis por si kaj triukis pokalon da vino)

Mi scias. Torĉon

Estingu, se vi enlitigos antaŭ Mia reveno. Bonan nokton.

SALVIUS:

Bonan, Bonŝancan nokton!

PRONAKS:

Kaj bonvolu zorgi Ke l'frogo estu plenigita; povas Okazi ja ke ĉi afer' la manojn Per sang' makulos.

(Li elrigardas en la nokton kaj iras for.)

(La gardisto preterpasas.)

SALVIUS:

Sur mallumaj Siciliaj akvoj
La fiŝkaptistoj iras for...

(La kurteno falas.)

SCENO II.

Sur Troja murego. Kapis, juna trojana soldato, staras garde, elrigardante super la ebenajon, kie la Grekoj estas enkampitaj. Ilus, alia juna soldato, lia amiko, vestita per ursofelo, venas al li.

ILUS:

Gardvico via, kiam ĝi finiĝos?

KAPIS:

Post ĥoroj du: meznokte.

ILUS:

Ho, jen, estas Belegaj tiuj tendoj sub la steloj. La nokto estas mia: inter ilin Foriri kiel ombro, kaj post kapto De greka viv' reveni kiel ombro Denove. Estas kurioze gajni Lertecon tian en junaĝo frua. Du jarojn, unufoje po semajno. — Jam cento, pli ol cento kaj nur unu Maltrafo. Jam cent grekaj knaboj, Kapis Similaj al mi mem — amantaj, en Honor' rapidaj kaj sentimaj. — En Relec' ilia difektitaj pere De mi, kies deziro ĉiam estas Belec', de kiam ĉe arbustbariloj Unue mi promenis dum aprilo. Se nur la temp' vizaĝon de Helena Efikus, eble tiuj ĉi naŭ jaroj De malpaciĝ' finiĝus, kaj pli saĝa Fariĝus Troj', kaj ĝiaj konsilantoj, Nun konfuzitaj, por puriĝ' kaj por Foirvetur' ricevus velurilojn. Kaj kio do pri mar-knabino via, Ĉu ŝi elkreskis jam?

KAPIS:

Vi, amiko,

Demandas ĉiam tion ĉi. Ciziloj Rustiĝis, la lineoj estas jam En tolsurtutoj miaj; la marteloj Rompiĝis. Ilus, en animo mia Mi vidis membrojn fortajn kaj flekseblajn, Beleco de virinoj movis sin al Naskiĝ' mirakla en imago mia; Konceptis mi la korpon de la homo Faranta Dian klarparolon pri La ĝojo, kiu fluas senkalkule En ĉiu paŝ' feliĉa de saneco. Popol' svarmanta sur Troj-stratoj devus Mirinde flori sur marmoro mia; Doninta estus mi al mia lando Malkaŝon dolĉan, kiel ĝia fero Ja al mi estis. Kaj ankoraŭ estos, Se iam de spirito mia falos Tiu malkara monotono, kiu La mondon igas simpla eĥo, ĝian Vivantan geston forigante. Trojo En paco estos Trojo grandioza, Ĉar mi ĝin faros tia.

ILUS:

Estus bele,

Se Trojo fine tiamaniere Nin uzus, kiel ĝi nin povus uzi. Konstrui, kanti, honestecon turni Al ĝia foirplac', popolon ĝian Instrui, ke malbono ĉiam estas Rezult' de letargia mens'. Mi vidis Ĉi Trojon en imago, ekflorintan En simplan regnon, kie la envio Mortinta estas, ĉar neniu homo Parolas vante pri afero, kiun Ne konas li. Ho, Kapis, ni malmulton Bezonas ĝis justec', ni ĉiuj estas Faritaj tiel noblaj, se nur agus

(legas)

Ni laŭ nobleco nia. Kial ni Militi devas kontraŭ tiuj grekoj? Okazis ia koleriĝo, ia Ekhol' de l' sango antaŭ jaroj, kiam Pariz' Helenan sian portis Trojen; Kaj Menelaos kriblekis post kalkanoj. Sed tio estas forgesita nun, Neniu tamen povas ekhaltigi Ĉi tion, kion ĉiu malamegas. Tre ofte pensis mi, dum tiuj noktoj En kiuj mi danĝere pasis inter La tendoj grekaj, kiel bone li, De kiu ŝtelis mi la vivon, kaj mi, Prosperus kune, en aspir' komuna Por bon' de tiu aŭ alia celo Homara. Mi naŭziĝis kaj daŭrigis Denove bati, kiel Troj' ordonis, Ĉar juro estas stranga kurkulio En cerbo.

KAPIS:

Kiu tie?

VOĈO:

Trojo kaj

La Troja morto.

KAPIS:

Preterpasu Trojo!

Silento kuŝas sur la ebenajo Ĉi nokte, kaj la steloj estas lumo Lanterna kontraŭ vi. — Vi devas iri Singarde, Ilus. Perdo de multnombraj Amikoj pliakrigis mian amon, Ne obtuziĝis min la perd'. Mi plenas De zorgoj pri vi en ĉi nokt' kun ĝia Beleco de somer' flamanta. Eble Ĉi nokton malsukces' elektis tiel Kruela kiel la fatal' deziras. Singarde do!

ILUS:

Mi tiel bone konas

La tendumitajn plaĉojn kaj la multajn Vojstrekojn inter tiuj grekoj, kiel Mi konas Trojnuregon; kaj mi povas Trapasi nokte manproksime de Okul' gardista, kaj aperi kiel Ombraj' de nubo aŭ de vent' movata Arbel'. Memoru, jam cent fojojn.

KAPIS:

Tamen

Deziras mi ke mi mem povus preni Danĝeron vian aŭ dividi ĝin.

ILUS:

Ne; en ĉi ago io kuŝas, kiu Pli estas ol kuraĝo. Kapis, via Cizil' ankoraŭ gajni devas vian Vizion en figuron por la monda Trankvil' kaj lum'. En tagoj malfeliĉaj Tag' plej malbona estas, kiu frapas Profetajn lipojn. Via fero estas Labor'.

KAPIS:

Kaj via. — Tiu rev' pri Troja

Regenerad': ke kor' popola montru Sin en popola viv', oni ne estu Vundita priplorinde de estaĵoj En kiuj la aŭtoritato estas Pretendo uzi ĝin malbone, dum La homoj sub ilia tiraneco Retenas afablecon, atendante Je liberiĝo sia. Tiel povas Ni veni kune al laboro nia, Vi en la profeteĉ' pri viv' kaj mi En la kread'. Ĝis kiam nokto, Ilus?

ILUS:

Jam antaŭ fin' de via gardo venos Mi rec. Tie ĉi, sur tiu punkto, Ĉe mia signo, antaŭ noktpleniĝo, Aljetu la ŝnuregon, tiel: —

(Li fajas. Li grimpas super la romp-

aron al kiu li akroĉis ŝnuregon.)

Paco

Kun vi, ĝis mi revenos.

KAPIS:

Kaj bonŝanco

Kun vi, singarde iru, fartu bone!

(Ilus sin ĵetas malsupren al la ebenajo. Kapis suprentiras la ŝnuregon. Regas silento por momento.)

KAPIS:

(Paŝante tien kaj reen sur la murego.)

Ĉu Greko, ĉu Trojan', ja estas same, Se falas neĝ' sur nian somertempon Kaj se l' feliĉa rimo tagomeza Pro morto frua estas ne finita.

Burĝono ekflorinta nepre velkos, Kaj tamen vidos ĝi pli certe Majon, Ol juna homo maljunecon, kiam La morto estas ombro en spegulo.

Ĉe nia flanko, nevideble, ofte Moviĝas mortobata man', kaj kiam Ĝi falas sur junecon...

(Li aŭdas movadon malantaŭ si, kaj turnas sin rapide.)

Jen, kiu tie?

PRONAKS:

Greko, malbonŝance

Por armilar' trojana. — Grek' en juro, Terura en obeo!

(La superfalo estas tiel subita, ke Kapis falas sen krio, la ponardo de la Greko en lia brusto. Pronaks el-tiras ĝin, alrigardas sian mortintan kontraŭulon, ektemas, rigardas trans la muregon, kaj tre singarde malsuprengrimpas ĉe la punkto, kie li venis.)

(La kurteno falas.)

SCENO III.

La greka tendo denove. Salvius ankoraŭ legas, kaj la torĉo brulas. Servanto alportas grandan kruĉon da akvo, el kiu li verŝas en la trogon ekster la tendo. Ilus en sia ursofelo vidiĝas alproksimiĝanta silente. Li atingas la tendon malfermante ĝin sen ia bruo, kaj en la sama ne interrompita silento lia ponardo eniras la koron de la Greko. Ilus ekkaptas la falantan mortintan homon, kaj lasas lian korpon fali sur unu el la kuŝejoj interne de la tendo. La gardisto preterpasas. Ilus senspire atendas ĝis la paŝoj estas forpasintaj, kaj tiam, ŝtele, kiel li venis, li malaperas. Estas paŭzo. Pronaks alvenas el la mallumo, kaj, ĵetinte sian surtuton sur la teron, iras rekte al la trogo kaj komencas lavi siajn manojn.

PRONAKS:

He, kio, ĉu ankoraŭ vi maldormas. Kaj legas? Tiuj kantoj certe estas Maloftaj, se soldaton tenas ili El lito nokte. Uff! — Salvius, estas Kelkfoje abomene. — Li ne havis Eĉ tempon por vorteto. — li proaĉenis La muron sub la steloj ĝuste kiel Amanto inter lunlunitaj rozoj. — Ĉi tiu purigado estas bona — Li estis deklamanta iaajn versojn, Mi pensas, ĝis la morto interrompis. Malvarma akvo estas bona post Ĉi tiu kortuŝanta ago, ĝi La menson refreŝigas por komforta Ekdormo. Tamen, jen farita la Afer', kaj sanigilo forta estas La dorm' por ĉiuj ĝenoj.

(La gardisto preterpasas.)

Estas tempo
Ke l' torĉo estu estingita. Mi ne
Bezonas ĝin, kaj vi jam devas esti
En lit'. Salvius...

(Li enrigardas en la tendon
je la unua fojo.)

Kio, vi jam dormas,
Kaj en vestaĵ' ankoraŭ? Tio estas

Malzorga ag' amiko; kaj la torĉo
Brulanta... Salvius...
Salvius. He, Salvius... Dioj!! Amiko!
Salvius... Salvius...

Mortinta, ag' farita, ag' farita...
La juĝ' farita, la belec' — rompita...
Kaj tie sur la Troja muro, iu
Alvenos same... iu alvenos same...

(La gardisto preterpasas.)
(La kurteno falas.)

SCENO IV.

La Troja murego. La korpo de Kapis
kuŝas en la stellumo kaj silento. Post
kelkaj momentoj la signalo de Ilus
venas de malsupre. Paŭzo. La signalo
estas ripetita. Paŭzo.

(La kurteno falas.)

El la angla, kun la permeso
de l'aŭtoro: J. D. Applebaum



GRECO :

PENTANTA ST MAGDALENA

LA AMPOEMO DE JAN MIJS

MAURITS SABBE*



Ĉe kiam Jan Mijs estis en la retorika klaso, li ŝanĝiĝis. La kamaradoj vere ne sciis kio okazis al li.

En la unuagradaj klasoj li ĉiam faris kiel la aliaj. Kiam oni elpensis farson, li ĉiam estis preta ludi rolon en ĝi kaj neniam estis trovebla pli konfidebla, lojala kunkulpulo. Li povis gardi sekreton kvazaŭ tomo; lerte kaj maltime savi amikon, kiu estis preskaŭ kaptata; se necese, sin foroferi por savi aliajn de pli gravaj punoj. Jan Mijs estis „bonulo“, kiel la knaboj diras. Kvankam li neniam sin elvidigis en la klaso, tamen lia nomo estis honore ligita al ĉiuj faritaĵoj, per kiuj la sinjoroj retoriklernantoj dum antaŭaj jaroj famiĝis.

Sed nun tio estis finita. Ili ne plu devis paroli al li pri farsoj, li nomis tion infanaĵoj. Kiam la aliaj tamen faris ilin, li ne partoprenis kaj ŝajnis eĉ, ke li arogante malaprobis. Eĉ dum la desegna kurso kaj ĉe la Urso, dum la matematika kurso, dum kiu li antaŭe estis ja kelkfoje la agitodirektanto, li nun estis modele trankvila kaj ŝajnis ĉiam studenta. Mijs fariĝis serioza junulo, komplimentis la desegninstruisto.

Tion la aliaj knaboj juĝis infana.

— Li pozas, — opiniis Verleyen, — sed se li kredas ke „ni“ imitos lin, li eraras...

— Li ludas avon, — diris Bollekens, — kaj mi estas lia kara nepĉjo...

Kiam Mijs aŭdis tian ŝercon, li ridetis kaj silentis.

Li pli bone sciis tion. Ne estis ŝajno de pozo en lia agado, sed io pli vera, pli nobla. Tute speciala interna viveto estis ekflorinta en li kaj plenigis kaj superregis lin pli kaj pli.

Fore de la okupoj de liaj kamaradoj, fore de iliaj banalaj ludoj kaj habiladoj kuŝis nun lia ĝojo. Li serĉis la lokojn, kie estis tre trankvile, en la ĝardeno, aŭ pli prefere ankoraŭ en sia studĉambro kun ĝia belega perspektivo sur la rivereton, kiuj preter kadukiĝintaj ŝtuparaj fasadetoj kaj malaltaj ĝardenmuretoj serpentumis kun dependanta verdaĵo tra la malnova urbo. Tie estiĝis tiam en lia spirito fantazioj, kiuj estis sunaj kiel la ridanta ĉielo, aŭ beate melankoliaj, plene de vaga deziro kiel la kanteto de malproksima sonorilaro, kiu kantis en la vespera krepusko super la urbo.

Tio ja ne estis subite okazinta. Dum la du lastaj jaroj jam ipmete ekkaptis lin de tempo al tempo tiu kvietaj ĝojo de pripensado kaj revado inter liaj krudaj ludoj kaj furioza bruego.

Tio plej ofte okazis kiam li estis leginta ion belan... Inter liaj lernolibroj estis kelkaj, kiujn li avide legis. En la kvara klaso estis „Ernest Staes“.* La ĉarma Bertha estis almenaŭ tiel adorata de li, kiel de Ernesto. Same heroe Jan Mijs estus defendanta la belan infanon. El tiu libro eliris pli ol la karesa ravo de la rakontoj, kiujn li legis dum sia infaneco. Elblovis el ĝi vento de realeco, kiu vekis lin por nova vivo. Li jam pripensis ĉu inter la knabinojn, kiujn li konis, ne estis unu, kiu povus iĝi „lia“ Bertha. Ĉu Jenny de la poŝestro ekzemple? Ĉu Jenny, kun ŝiaj grandaj, belaj okuloj? Kiam Jan, post tiu penso, la unuan fojon reenkantis ŝin dum la irado al la lernejo.

* *Maurits Sabbe*, kiu naskiĝis en 1873, estas unu el la plej famaj nuntempaj flandraj verkistoj; li apartenas al neniu speciala literatura skolo kaj estas artisto kun profunda sento kaj poezia animo. Li verkis multajn novelojn kaj romanojn, kiuj ĉiuj ludas en lia naskiĝurbo Bruĝo. Li ankaŭ verkis belajn teatraĵojn, ĉarmajn opertekstojn kaj rimarkindajn kritikadojn. Nuntempe li estas konservisto de la fama „Muzeo Platijn-Moretus“ en Antverpeno. (Noto de la tradukinto.)

** *Ernest Staes* de Anton Bergmann estas fama verko el la flandra literaturo. (N. d. l. t.)

li tiel ruĝiĝis, ke li de tiam evitis eĉ vidi ŝin por ne malkaŝi sian sekreton.

En la dua kaj precipe en la tria klaso malfermis lia naskiĝanta amo ankoraŭ pli belajn paradizojn. La prikskribado de la naskiĝanta amo en la „Kanto de la Sonorilo“ estis dum tiuj jaroj por Mijs la plej bela poeziaĵo, kiun homo povas ĝui. Precipe kiam d-ro Blomme varme kaj admire preparolis tiun parton de la poemo de Schiller, Jan vere ekstaziĝis. D-ro Blomme havis puran literaturan senton kaj sciis komuniki ion de sia belemo al la knaboj. Tio estis io tute alia ol la seka trokritikemo de Deval pri la „Poezia Arto“ de Boileau.

O, dass sie ewig grünen bliebe,

Die schöne Zeit de jungen Liebe!

Kiam Mijs revante flustris tiujn versojn antaŭ la fenestro de sia studĉambro rigardante la unuajn stelojn, tiam li havis la okulojn de Sankta Cecilia, interpretanta sur sia orgeno ĉielan inspiron.

Poste estis Hermano kaj Dorotea, kiuj kondukis lin al la murmuranta fonto sub la maljunaj tilioj. Li vidis ilin ambaŭ sin klinitaj super la klaran akvon kaj en tiu freŝa spegulo ridante rigardantaj je la unua fojo en la okulojn de la alia. Li pripensis, ke tio ja povis okazi ankaŭ tie, ĉe la rivero, sur la malnova ĉerpstupareto, kiun li vidis tra sia fenestro. Li vidis ŝin jam tie, rigardanta en la akvo la dolĉan kapeton de... jes, de kiu? Ĉu de Jenny? Aŭ ĉu de la malhela, ĉiam ridanta Valonineto, kiu nun loĝis ĉe lia onklo? Ne estis ja certe, kiun li elektus kiel Dorotean, sed malgraŭ tio lia plej pura adoremo iris al tiu benata... nekonatino.

Jan estis nun tute dronanta en la alta literaturo. Li jam eklegis la verkojn de Shakespeare! Nenio superis la balkonscenon el Romeo kaj Julia! Estis ja io por solece prifantazii dum klara lunvespero, ie apud la rivereto... Li sur la ŝnurŝtupetaro, kaj sur la balkono... Ĉu Jenny? Ĉu la Valonineto? Aŭ ĉu la filino de la latina profesoro, kiu, antaŭ nelonge, reveninte el la edukpensiono, kaŭzis inter la retortikaj lernantoj grandan sensacion per sia interesa paleco kaj mondfremda rigardo? Kiu? Nu, tio ne estis grava. Jan amis la amon pro la amo... Li ankoraŭ ne konis Dante Gabrielo Rossetti, sed li estus povinta ekkrii kun li: „I loved thee ere, I loved a woman, Love!“

Jan estis plej forte ekkaptita per la „Buch der Lieder“, sen-egala ravo. Ĉiuj kluzoj de la sento ĉi tie abrupte malfermiĝis kaj Jan estis kuntrenata. Tio estis ja pli bela ol ĉio, kion li revis; la romantiko de lia dekokjara aĝo kantis tie pli alte kaj laŭte ol li iam konjektis. Jes, tiel estas ke la amo ĝojas kaj ploras, venkas kaj malesperas. Kaj per la ofta legado de tiuj kantoj li ja certigis, ke ĉiuj tiuj emocioj estis ankaŭ la liaj.

La fatala, neevitebla sekvo de tiu fantaziado estis, ke Jan Mijs ekfaris versojn. Li sentis la deziregon honori la idealon de sia nemateria adoro per girlandoj de ritmoj kaj rimoj. Ĉe li almenaŭ la lecionoj pri nederlanda versfarado de D-ro Blomme estus donontaj iom da praktika utilo. Jean Bollekens, la Bruselanaĉo, kiu ne estis literaturema kaj ne ŝatis la nederlandan lingvon, ĉiam malbonhumore diris pri tiuj lecionoj:

— Kion ni faros per ĉiuj tiuj bazaraĵoj? — estis lia granda plendmotivo. Ni ja ne estas „pojetoj!“

Jan Mijs estus pruvonta la malon. Li tute seriozis kiam li konfidis siajn unuajn amorimojn al la papero. Li rakontis ĝin al neniu. La versfarado estis ja laŭ multaj io maldeca. Kaj amoversoj ja! Tiu rimado devis resti dolĉa sekreto, kiel la tuta interna vivo, per kiu Mijs depost kelkaj monatoj tiom plezuris. Neniam virino estis pli alte kaj pure amata

ol la nemateria estulino, kiun Mijs kreis por si mem per la plej rava, kion li trovis en siaj libroj, kaj per la plej viglaj imagoj, kiuj ekfloris en lia juna spirito. La versfarado enhavis por li ion naive pian, kiel la ritoj de sekreta kulto.

Certe ne estis majstroverkoj, kiujn Mijs produktis, sed liaj versoj estis tamen tute aliaj ol la kutimaj larmaj plendoj, plenaj de sentimentaleco, de la „unua-pantalon“-rimantoj. Neperfekte sed sincere li elverŝis tion, kio okazis en lia gaja kaj sana spirito. Kion li revis kaj deziris, tion li vidis kiel realecon kaj li prikantis ĝin per vigla, ĝojema ritmo. Estas vere, ke en unu poemo la adorata knabino havis linbuklojn kaj en alia korvbuklojn, kaj ankaŭ en unu blujn kaj en alia karbnigrajn okulojn, sed en ĉiuj estis ĉiam la dezirata, ankoraŭ nereala virino, la loga „ewig weibliche“, kiun lia juna koro sincere kaj senmalice prikantis.

La poezia obsedo grave okupis Mijs. Komence li interlatiĝis kun la Muzoj nur en sia studoĉambreto, sed baldaŭ li riskis ankaŭ rimi kaj skandi en la desegnoklaso kaj dum la teda aritmetika kurso de la Urso.

Estis ja ja je fino de la studoj kaj multan gravon oni ne plu efektiviĝis. Mijs lasis do ludi la aliajn kun sinuso kaj kosinuso kaj malantaŭ amaso da libroj, nu, li rimis sur peceto de papero.

Lia kanteto estis finita, sed per krajono li faris super la versojn linietojn kaj krampetojn por certigi ĉu la triopa mezuro, kiun li ĉi tiun fojon elektis, estas ĉie nekritikebla.

Bollekens rimarkis tion. La linietoj kaj krampetoj certigis lin. Mijs faras poemon. Tio estis ridiga! Mijs „pojeto“! La vizaĝo de Bollekens heliĝis de ĝojo kaj, sen atento pri la Urso, li ekstaris por ke li povu legi la poemon. Kiam Mijs tion rimarkis, li koleriĝis kaj forpuŝis la troscivolan, ĝenan Bruselanaĉon. Tio kaŭzis tuj egan moviĝadon.

Ĉiuj knaboj sin turnis kaj la Urso venis de malantaŭ sia katedro.

— Li faras „pojemon“! — ridante diris Bollekens, kiu prenis la papereton de Mijs kaj ĝin suprentenis.

Mijs tiris ĝin el liaj manoj kaj disŝiris ĝin.

— Nu! Nu! akre parolis la Urso, donu al mi tiun paperon!

Mijs kuraĝe klopodis malebligi ke la Urso ĝin ekkaptu, sed vane, la ursungego baldaŭ tenis la poemon. Tre embarrasita Mijs ankoraŭ ne estis. La Urso estis ja Valono kaj ne multe komprenos de liaj flandraj versoj, li esperis...

La Urso metis la disŝiritajn paperpecetojn sur sian katedron unu apud la alian kaj klopodis tutigi ilin kiel „puzlon“. Tio ne facile efektiviĝis, sed tamen li opiniis ke li sufiĉe sciis por abrupte paroli kun indigno al Mijs. Sur unu de la paperetoj li legis laŭte kun komika akcento:

— „Mi vidis kaj kisis vin!“ La tuta klaso ekridegis, kio igis la Urson ankoraŭ pli kolera. — Do estas tio kio sensaĝigas vin, sinjoro Mijs! Estas malinde! Forlasu tuj la kurson!

Bollekens, kiu tuj eksentis kian stultajon li estis farinta, volis savi Mijs. Li pledis kaj petegis, sed la Urso ne kompatiĝis. Mijs estis forpelata tra la pordo kaj la disŝirita poemo transdonata al la liceestro.

Dum la paŭzo, dum Bollekens ricevadis de siaj kamaradoj kelkajn punajn boksbatojn kaj kvazaŭ izolite en kvaranteno ĉirkaŭiradis kun konscienciproĉo, la afero Mijs estis enketata per la studoprefekto en la ĉeesto de la Urso. La akuzo estis kvarobla: malatento, malobeo, perforta, kontraŭstaro, kaj... jes, kvankam la lasta peko ne estis certe, klare nomita, ĝi tamen plej peze surpronis sur Mijs.

La studoprefekto ja rapide solvis la „puzlon“ de la disŝiritaj paperetoj kaj la „corpus delicti“ kuŝis antaŭ li kiel nepridiskutebla akuzo. Tiel estis la poemo de Mijs:

Mi vidis kaj kisis vin, karegulin',
Parolis pri amodoloroj,
Kaj en mia koro, brulanta en sin',
Ekfloris ja miloj da floroj.

Kaj inter la floroj resonas la kant'
De gaje fajfanta birdeto,
Kaj tie interne kun daŭra konstant'
Ĝi sonas kun dolĉa diskreto.

Por vi, amatin', mi ripetos ja ĝin,
— Ĉar ĝin mi neniam forgesos —
Tuj kiam denove renkontos mi vin
Kaj mi viajn harojn karesos.

— Estas bele, sinjoro Mijs! — komencis la liceestro kaj li detale ekparolis per severaj, solenaj vortoj pri la ekcesa malseriozezo kaj malbonmoreco, kiujn la poemo pruvis. Ha, li ne malaprobis la nuran versfaradon, li ankaŭ faris tion dum sia licetempo, — tradukojn kaj parafrazojn el Ovidius kaj Virgilius! Sed la spirito de la poemo de Mijs estis tute malbona kaj konjektigis la plej gravan pri la bonmoreco de ĝia aŭtoro. La liceestro ege kompatis patron Mijs, kiu certe ne meritis tian filon.

Ĉiuj tiuj tragediaj konsideroj ne tiom sensacie impresis Mijs, kiel la liceestro atendis. La konscio pri lia senkulpeco kaj la pureco de liaj intencoj lasis Jan relative kvieti. Kial ili devis ja kompreni tion tiel laŭlitere! Li estis nenium vidinta kaj nenium kisinta kaj al neniu parolinta pri amodoloroj... Sed ĉu li ja povis klarigi al la liceestro kaj al la Urso, kial li tamen tion skribis? Ili tamen nek komprenus, nek kredus tion. Li do lasis sin akuzi ne defendante sin.

Kiam Mijs venis hejmen, oni estis jam informita tie pri la okazintaĵo. Patrino ne parolis eĉ unu vorton kaj patro petis tute ne afable al Jan veni kun li en lian oficejon.

Sur la pupitro kuŝis tie ne nur la disŝirita poemo, sed ankaŭ la kajereto, en kiu Jan transskribis siajn aliajn poeziajn elverŝojn. Patro do traserĉis lian studoĉambretan, flaresploris liajn plej karajn sekretojn! Do li trovis ti ankoraŭ ion alian krom la poemeto de „Mi vidis kaj kisis vin!“ Kaj se li opiniis ke la lasta estis maldeca, kion li pensos pri la resto? Nun nur Jan komprenis kiom kompromita fariĝis lia fantaziero por li. Patro kompreneble pensos, ke Jan vere estis kulpa pri diversaj sekretaj amaventuroj. Temis ja pri promenado kun la amatineto en la „arbarena gigantan“, kie ili ambaŭ tranĉis sian nomon en la „lignon vivantan“; pri „lulanta danco“ kaj „rava romanco“; pri intencita forkuro al malproksimaj, nenomitaj landoj, dum kiu la forkuranta paro trankviligis sian soifon per „la akvo de la fonto“ kaj nutris sin per fruktoj „kreskantaj sur la monto“; pri remekskurso en „belega boato“ en la „arĝenta lunbrilado“. Jan konfesis per tio, ke li estis vera Don Juano.

Patro Mijs estis ja saĝulo. Li nur riproĉis al sia filo ke li vante perdas sian tempon per tiaj malgravaĵoj, je la malprofito eble de liaj gravaj studoj. Kontraŭ tio Jan povis certigi, ke tio ne estis la fakto. Li ja sciis ke li por la ekzamenoj de la lasta jarkvarono multe laboris kaj ke la rezultatoj estos bonegaj.

Pri tio kvietigite, patro Mijs malmulte parolis pri la maledifo de la versoj de Jan. Li nur demandis kun penetra ironio, ĉu estas permesate al li koni la knabinon, kiu tiel frenezigis lian filon.

— Ho patro, tiu knabino ne ekzistas! — respondis Jan konfuze.

— Ne estas kialo por kaŝi la veron, — insistis ankoraŭ patro Mijs. Mi tre bone komprenas, ke knabo kiel vi povas pensi pri knabino, sed mi necias kial tio devas resti sekreto por mi... Ni tamen estis ĉiam bonaj amikoj, ĉu ne, Jan?

Tiuj bonaj, seriozaj paroloj tiom tuŝis Jan, ke al li, nervoza pro ĉio kio okazis, venis larmoj en la okulojn.

— Mi sincere diras la veron al vi, patro. Tiu knabino ne ekzistas.

Patro ne plu insistis. — Jan skribis siajn puntaskojn por la Urso kaj la liceestro kaj oni ne plu parolis pri la okazintaĵo. Nur la patrino, kiam patro parolis al ŝi pri la afero, rimarkis kun konstanta ĝemetado.

— La knabo legas multe tro da libroj! Mi ĉiam diris tion . . .

Post la premidisdonado, kiu estis por Jan triumfo, patro Mijs parolis same :

— Nun fermu ĉiujn librojn kaj por tre longa tempo ! Vi iros en la kamparon, kaj tie vi promenos, biciklos, naĝos, faros ĉion kion vi deziros sub libera ĉielo ĉe kuzino Selica en Wijnvoorde, en ŝia malnova granda kampobieno. La kuzino estas sciigita kaj akceptos lin per malfermitaj brakoj. La pakajoj de Jan estis aranĝataj kaj la sekvintan tagon Jan forveturis al sia feriejo.

Kuzino Selica estis eksterordinare kontenta pri sia gasto. Li jam pli frue devus esti veninta por pasigi tie siajn feriojn. Dum kvar jaroj ŝi ne plu vidis lin. Ili ja fremdiĝas unu por la alia !

Kaj tio estis prava. Kuzinon Selica mem Jan ankoraŭ ja rekonis, ŝi restis neŝanĝita, la bonkora, fortika, flandra kamparsinjorino kiel antaŭe, sed ŝia filino, kuzineto Finjo, estis tiel metamorfozita, ke Jan ne povis kredi siajn okulojn. Ĉu tiu estis la sensignifa knabino pri kiu li antaŭ kvar jaroj tute ne atentis? Ŝi fariĝis vera fraŭlino, roza blondulino kun malicaj okuloj, en kiuj ridante kaj alloge brilis fajrero de „mi-scias-ion“, kiu tuj imponis Jan. Kaj kiel urba ŝi estis laŭ vestado kaj manieroj ! . . . La edukpensiono mirinde sennaivigis la kamparineton el Wijnvoorde.

— Nun vi kune povos praktiki vian francan ! diris al ili kuzino Selica. Parolu ĝin ja la tutan tagon.

Sed estis multe pli ofte ilia dolĉa flandra kiun ili parolis. Jam de la unua tago ili estis bonegaj kamaradoj. En la ĝardeno, kie estis nun meze de rikolttempo de abrikotoj, grosoj kaj tiel plu, ili estis ĉiam kune. La unu ne povis esti sen la alia. Pli ol unufoje, kiam ili vagis inter la maljunaj fruktaroj kaj fagoj, kiuj tie iomete sovaĝe kaj dense kreskis, kaj ili iom ripozis en la ombro, ili ridetis unu al la alia ne sciante kial, sed kun kreskanta ĝojo en la koro. Jan estis vundinta sian manon per dorno kaj Finjo flegis

lin kun kortuŝo, kiu tuŝis Jan mem. Ŝi lavetis la skrapvundeton kaj poste per sia propra naztuko bandagiis ĝin kaj senĉese ŝi demandis al Jan ĉu li ankoraŭ suferas. En ŝi kompatema voĉeto kuŝis dolĉeco, kiu ravis Jan.

La sekvintan tagon, je vesperiĝo ili estis venintaj al la malnova, vermotrua balancilo je la fino de la ĝardeno. Ili ekŝidis sur ĝin, unu apud la alia, tre dolĉe balancigante, kvazaŭ nesciante kion ili faras. Apud ili, malantaŭ la arbeto-baro, kuŝis la kapelo de la monaĥejo, tute kovrita per hedero, en kiu arego da birdoj vesperkantis. La suno disĵetis lastan orbrilon trans la rosvarmetan ebenajon de la herbejoj antaŭ ili. Ili ambaŭ revante rigardadis la ankoraŭ videblan duonon de ĝia bruleganta disko.

La kapo de la kuzineto kliniĝis sur la ŝultron de Jan kaj iliaj manoj senserĉe trovis unu la alian. La balancilo pendis streĉe senmove. La lasta brileto de la suno foriĝis. Ĉiam pli mallaŭte kantetis la birdoj, ĝis fine ili eksilentis.

Tiam Finjo metis siajn brakojn ĉirkaŭ la kolon de Jan kaj flustris en lian orelon ne rigardante lin :

— Jan, mi tiel amas vin !

La kapo de Jan turniĝis kaj li ne sciis ĉu li maldormas aŭ songas, kaj ĉio kion li trovis por diri estis :

— Finjo, malheliĝas . . .

— Ho, tio ne gravas, Jan. Diru al mi ĉu ankaŭ vi amas min . . .

— Ho treege, Finjo ! . . .

Kaj ili kisis unu la alian je la unua fojo.

Tiam ili sentis kiel sankte kaj grande kuŝis la trankvilo ĉirkaŭ ili kaj ili ne plu parolis . . . Malrapide ili marŝis hejmen apudege unu al la alia sur la malglata vojo en la densa ombro de la arboj.

Patro Mijs baldaŭ spertis, ke la kamparaero ne estis pli bona ol la urba aero por la amemo de lia filo. Jan rakontis kelkajn monatojn poste, ke nun vere ekzistas knabino, kiu lin tiel kaj tiel . . . Kaj la patro aprobis !

Unu profito estis akirita. Depost la vespero sur la balancilo, Jan fine sciis, por kiu li faris siajn versojn.

*Kun aŭtora permeso el la flandra :
Jan van Schoor.*

V I K T I M O J

ROMANO EL LA VIVO DE SIBERIAJ MILITKAPTITOJ
JULIO BAGHY

SESA ĈAPITRO

La suno jam estis ĉe la zenito, kiam iu forte ekfrapis.

Marusa kuris al la pordego.

— He! Kiu? — ŝi demandis.

— Doŝky! — estis la respondo.

Marusa malfermis la pordegon kaj Doŝky eniris. Li aspektis iom komike. Manlarga ruĝa rubando, kiel ega banderolo, estis ĉirkaŭligita sur lia talio kaj ruĝa kvinpinta stelo koketis sur lia ĉapo. En la maldekstra mano li tenis pakajon kaj leterojn, per la dekstra li kondukis proksimume dujaran infaneton.

— Ĉu sinjoro Bardy estas ankoraŭ tie ĉi? — li demandis.

— Jes! Li ankoraŭ dormas.

— Ĉu li dormas? . . . Hahaha! Nu, veku lin, Marusa! Veku lin, mi devas paroli kun li.

Marusa scivole rigardis la infanon.

— Kies? — ŝi demandis.

— Mi ne scias! Dio sendis lin, — respondis Petro karesante la kapeton de la infano.

Marusa ekĝemis.

— Ho! Dio! Li vizitis nin ĉi nokte.

— Kiel? Kio okazis?

— La sinjoro . . . la sinjoro . . .

Marusa ne povis daŭrigi, ploro sufokis siajn vortojn.

Petro nerve urĝis sin.

— Kio okazis, parolu!

— La sinjoro mortis, — ŝi respondis preskaŭ blekante.

Petro konsterniĝis. Dum kelka tempo li eĉ ne povis ekparoli.

— Oni mortigis lin! . . . Nepre oni mortigis lin! — kriadis la bona knabino.

— Kie? . . . Eh! Sensencaĵo! La reĝimŝanĝo okazis sensange.

— Sinjoro Bardy diris tion al mi, hieraŭ vespere, kiam la sinjorino volis mortigi sin . . . Ho, Dio, vi tre vizitis nin!

— Kion vi diras? La sinjorino volis . . .

— Jes! Jes! Ankaŭ ŝi volis morti . . . Kaj sinjoro Bardy el-tordis la revolveron el ŝia mano . . .

— Terure!

Petro staris senmove, rigidiginte. La knabino ĉiam pli kaj pli laŭte ploris kaj ploris.

— Dio vizitis nin! . . . Ho kia malfeliĉo . . . La sinjoro estis tiel juna kaj brava . . . Li donacis al mi Kristnaske novan antaŭtukon. Tium ĉi antaŭtukon, kiun mi nun havas sur mi kaj . . . kaj . . . li donis eĉ dek rublojn . . . Li estis tre pia homo . . . Tia estas la sorto. La bonaj devas morti kaj la malbonaj restas vivantaj . . . Sed mi ja antaŭsentis la malfeliĉon, ĉar mi songis . . . Jes, jes . . . sinjoro Doŝky, mi songis, ke la sinjoro . . .

Petro interrompis la tedan virinan plendadon.

— Iru, Marusa, kaj veku sinjoron Bardy . . . Nu, ne ploru! Kio okazis, tio jam okazis, ni nenion povas fari kontraŭ la sorto . . . Nu, iru, Marusa! . . . Ne ploru tiel korŝire, ĉar . . . Ne ploru! . . . Nu!

Ili ekiris al la vestiblo. Ĉe la pordo de la kuirejo Petro transdonis la infanon al la bona knabino.

Kies infano? — ŝi demandis levante la infanon al sia brusto.

— Mi diris ja, ke mi ne scias...

Marusa iris en la kuirejon kaj Petro malfermis la pordon de la vestiblo. El la ĉambro aŭdiĝis egala spirado de dormanto. Singarde, senbrue li paŝis en la ĉambro.

En la ĉambro estis ankoraŭ mallumo, la fenestrotabuloj estis fermitaj. Petro serĉis alumeton, kaj dank'al ĝia lumo li trovis la butonon de la elektra lampo. Li turnis ĝin, kaj ĉirkaŭrigardis.

Johano dormis sidante en fotelo antaŭ la skribotablo. Lia kapo estis malsuprenklinita, lia mieno trankvila.

Petro tuŝis lian sultron.

— Johano!

Johano vekigis kaj konfuzite rigardis la vizaĝon de sia amiko. Poste frotante siajn okulojn li demandis mallaŭte.

— Kial vi venis?

— Kial mi venis? Mi havis timon pri vi. Dum la nokto estis reĝimŝanĝo kaj oni ne povis scii, kio okazos...

— Jes! Oni ne povis scii, kio okazos... — ripetis Johano kun rezigno.

Silento. Johano meditante rigardis antaŭ sin. Petro ektusis.

— Ĉu vere, ke oni mortigis la sinjoron prokuroron?

— Kiu diris? — demandis Johano surprizite.

— Marusa.

— Marusa scias nenion. Marusa estas malsaĝa kreitaĵo.

— Vi diris al ŝi.

— Mi?!

— Jes! Vi diris, ke la sinjoro mortis.

Johano penis rememori. Senpacience li komencis tamburi sur la brakapogilo de la fotelo.

— Marusa estas malsaĝulino... Li forkuris kaj nenio pli... Nu!

— Kial vi diris do, ke la prokuroro mortis?

— Kial mi diris? Mi nem ne scias... Jes. Mi scias. Ĉar li vere mortis en la koro de sia edzino... Nu!

— Kaj pro tio ŝi volis mortigi sin?

— Kiu diris tiam stultajn?

— Marusa!

— Marusa kaj ĉiam Marusa!...

— Ĉu ne vere do?

— Ne! Ne! Ne!... Nul!

Petro rimarkis, ke lia amiko estas tre nerva kaj, ke tiu ĉi nerveco kaŝas ion. Li ekiris al la pordo.

Johano haltigis lin.

— Kien vi volas?

— Hejmen.

— Ĵus vi venis kaj vi volas jam foriri?

— Mi vidas, ke mi venis en malĝusta tempo?

— Kial?

— Vi estas tre nerva...

Johano nun rimarkis la ruĝan rubandon de la amiko. Li ekkriis.

— Ĉu ankaŭ vi soldatiĝis? Malfeliculo!

Petro gaje ekridis.

— Ah! Kion vi pensas? Hieraŭ mi pruntedonis mian pasporton al iu kaj hodiaŭ, por sekure atingi la urbon mi prenis la „rubandon de diplomato“ el la teatra vestaro. Ĝi imponis.

Johano malgraŭvole ekridis.

— Petro! Vi ĉiam havas strangajn ideojn.

— Mi volis nepre renkonti vin, ĉar krom la timo mi havas ankoraŭ ion alian por vi.

— Kion?

— Poŝto venis por vi.

Johano kun subita ĝojo saltleviĝis.

— Kie? Kie? Donu!... Ĉu ĝi venis de hejme?

— Ne! — respondis Petro iom malgaje.

Johano residiĝis.

— Jam de ses monatoj ne venis eĉ unu linio. La lasta estis sen alparolo kaj subskribo.

— Eble estas malfermesite skribi pli.

— Bone... bone, Petro! Nur konsolu min! Mi sentas, ke hejme jam enterigis nin la distanco kaj la tempo.

— Vi estas tro imagema!

— Konsolu min, Petro! Nur konsolu! Sed klarigu al mi, kial ricevas la aliaj longajn leterojn. Kial iliaj geamatoj estas pli eltrovemaj ol la miaj? Kial ili uzas ĉiun rimedon por sendi sciigojn al la edzoj, patroj, fratoj, fianĉoj... Kial nur mi estas duonfilo de la sorto? Jen estas Dogler! Li ricevas preskaŭ ĉiusemajne leteron de sia edzino... Kial?

Petro ne povis respondi. Li havis pensojn, kiujn li ne kuraĝis diri.

— Ĉefere, de kie venis la leteroj?

— Unu pakaĵo kaj du leteroj... Vi tamen ĝojos...

Petro iris en la vestiblon, kaj post momento li revenis. Pakajon kaj leterojn li metis sur la skribotablon.

Johano rigardis ilin. Subite sincera ĝojo montrigis sur lia vizaĝo.

— El Svisujo — li kriis surprizite. — Libro! Esperantaj libroj kaj ĵurnaloj. Ho kiel mi ĝojas! Petro, veraj libroj. Nutraĵoj por la cerbo... Ho Dio mia! Petro, rigardu! Kiel belaj, kiel valoraj!

Johano sinforgese ĝojis. La librojn kaj ĵurnalojn li karesis per tremantaj manoj. Li eĉ forgesis pri la leteroj.

Petro kortuŝite rigardis la naivan ĝojon de sia amiko.

— Nu kaj la leteroj? — li demandis.

Johano estis vere ekscitita. Rapide li foliumis la librojn, kvazaŭ volante tuj ekkoni ilian enhavon.

— Tuj! Tuj! — li respondis kaj prenis la poŝtkartojn.

Li legis. Dum la legado ankoraŭ pligrandiĝis lia aklama ĝojo.

— Poŝtkartoj de miaj iamaj korespondantoj. Jen, ili eksciis el niaj gazetoj, ke mi estas militkaptito. Ho kiel ĉarme ili skribas! Kiom da delikateco!... Petro!... Petro! Rigardu!

— Mi ne komprenas!

— Sed vi devas kompreni la homan senton, kiu diktis ĉi tiujn liniojn. Unu el Anglujo kaj la alia el Fracujo... Jen vidu! Tia estas la malamikeco artefarita! Nia movado savos la mondon. Mi diras tion al vi.

Petro malgaje ridetis kun duba mieno. Johano rimarkis tion.

— Eh! Vi estas skeptikulo! Vi volas rompi mian ĝojon.

Petro tre milde rigardis sian amikon.

— Ne, Johano! Tiu ĉi kurba ridelo havas alian kaŭzon. Mi estas kortuŝita de via ĝojo kaj kredo. Sed, bone konante vin kaj vian entuziasmon, mi ĉiam timas, ke vi havos fatalan seniluziigon. Trompiĝoj atendas vin en la vivo. Vi estas tro sentema por fariĝi vere feliĉa.

Johano iom pripensis.

— Vi estas prava, Petro! Mi estas revulo, mi vivas en sonĝoj. Se iu forprenus de mi tiujn ĉi sonĝojn, kiuj fariĝis mia viveco, mi nepre mortus. Vi estas prava, Petro! Multfoje mi sentas, ke mia vivo estas nur kartfortikaĵo, kiun mi konstruis sur songfundamento, por ke mi ne estu senĉese turmentata per la vido de la ruinoj. Vi estas prava kaj tamen, tamen...

Petro prenis seĝon por si kaj sidiĝis apud Johano.

— Johano! Mi ne volas disŝiri viajn iluziojn, sed — vi tute ne konas la homojn. En la mondo de viaj revoj ili estas vestitaj per la brilo de tiu ĉi mondo, ili parolas ian lingvon fean, havas korojn diafanajn kaj sentojn kristalajn. Kaj en tiu ĉi konstanta vizio vi iras preter la realo, ne vidante, ke la koroj estas kovritaj per malpuraj sekretoj, ke tiu kristalo havas makulojn. Vi faris el via koro altaron kaj metis sur ĝin la Virinon...

Johano interrompis lin.

— Mi metis sur la altaron la solan virinon, kiun mi amas: mian edzinon.

— Kaj vi mortigas ŝin.

— Mi ne komprenas vin.

Petro rememoris pri Dogler, kiu, post la fatala sortbato, nun kuŝas sur sia litbenko en plena apatio. Li volis rakonti ĉion al Johano, sed vidante antaŭ si la reveman homon li ek-sentis grandan kompaton kaj tiu ĉi sento fermis liajn lipojn.

Johano ridetis.

— Nu kial vi ne klarigas vian strangan aserton?

Petro iom pripensis kaj ekparolis.

— Ne miskomprenu min, Johano! Mi estimas vian edzinon, kvankam mi ne konas ŝin. Mi estimas ŝin, ĉar ŝi estas via edzino, sed mi devas diri, ke vi ne amas ŝin... Pli ĝuste, vi ne ŝin amas, sed iun alian, iun imagitan estaĵon, kiun vi levis sur piedestalon de la perfekteco... La virino, kiu okupas la altaron de via koro, ne estas plu via edzino, la tera kaj erarema virino, sed idolo, kiun vi kreis por vi laŭ la eksteraj de via edzino. La tre sopirata revido povos depuŝi la idolon kaj frakasi ĝin en pecojn. Sed tiam ne malbenu la sorton, ĉar viaj sonĝoj mortigis ŝin.

Johano silentis. Profunde lin impresis la vortoj.

Petro daŭrigis.

— Jam de longe mi atentis vin kaj mi devis konstati, ke en vian koron enŝteligis la bildo de alia virino. Ŝi estas mem la pulsanta vivo kaj via edzino vivas nur en viaj sonĝoj. Kontraŭvole vi faras komparon. Ju pli reala estas la unua, des pli fariĝas sonĝobildo la dua, ĝis kiam ŝi ŝajnos al vi sanktulino... Sed la realo, la renkonto nuligos viajn revojn...

— Vi aludis pri Katja. Ĉu ne? — demandis Johano malgaje.

— Jes!

— Vi eraras, Petro. Mi ne amas Katjan... Mi tute ne amas ŝin...

Petro montris al la pordo de la dormoĉambro, el kiu aŭdiĝis brueto.

Johano volis ankoraŭ diri ion, sed Marusa venis en la ĉambron kaj portis la samovaron.

— Ah! Sinjoro Doŝky! — komencis ŝi kaj ekĝemis. — La knabeto ĉiam demandas pri sia patrino. Kion mi diru al la etulo?

Doŝky leviĝis kaj ekiris al la pordo.

— Pri kia infano vi parolas, Marusa? — demandis ŝin Johano.

— Pri la mia! — rapidis respondi Petro kaj iris el la ĉambro.

Johano mirigite sin turnis al Marusa.

— Kies infano?

— Mi ne scias... Ankaŭ sinjoro Doŝky ne scias...

Doŝky revenis kun la infano sur la brako. La infano estis ĉarma. En liaj grandaj okuloj brilis larmoj de ĵus ĉesinta ploro.

Doŝky ridetis jen al la infano, jen al Johano.

— Nu, kiel li plaĉas al vi? — li demandis.

— De kie vi prenis tiun ĉi bubeton?

— Dio lin sendis al mi, aŭ la reĝimŝanĝo, se tiel pli bone al vi plaĉas.

— Kion vi volas fari kun li?

— Provizore nenion, ĉar mi ne scias, al kiu li apartenas. Mi pensis, ke la sinjorino estos tiel bona kaj donos al li iom da varmo el sia hejmo.

— Kial la sinjorino? Kial ne ni?

Doŝky ekridis.

— Terure naŭva vi estas, Johano! Ĉu vi opinias, ke la rusoj lasus ĉe vi infanon?

— Kial ne? Mi havas bonajn konatojn en la urbo kaj per ilia subteno mia petskribo al la komandantaro de la militkapitejo nepre havos favoran akcepton... Nu!

— Ho vi, naŭvulo!

La senĉesa ridado de Doŝky incitis Johanon. Nerve kaj ofendite li turnis sin de li.

— Eh! Vi ne havas koron, Petro!

La rido de Petro nun kvazaŭ eksplodis. La infanon li metis sur la kapon kaj li mem iris ĉirkaŭpreni Johanon.

— Johano, Johano! Vi, nekuracebla revulo! En via mizero vi volas ankoraŭ revii pri novaj zorgoj. Vi estas, kiel la sentema bovino, kiu blekas je sia forprenita ido kaj vidante fremdan bovideton jam estus preta mamnutri ĝin anstataŭ la sia.

— Dankon por la trafa komparo!

— Volonte!

— Vane vi ridas. Petro, ĉar malgraŭ ke vi estas cetere bona knabo, tamen vi ne havas koron por la infanoj.

La infano ekploris. Doŝky kuris al li kaj per mallertaj grimacoj, per ŝercaj petolajoj li sukcesis ĉesigi la ploron.

Marusa, kiu nenion komprenis el ilia hungara interparolo, ekĝemis kortuŝite:

— Sinjoro Doŝky havas bonan koron!

Doŝky ekridis. Johano grumblante, sed jam paciĝinte rimarkis.

— Marusa, vi ĉiam parolas malsaĝaĵojn.

La pordo de la dormoĉambro malfermiĝis. La sinjorino venis en la ĉambron. Ŝi afable ridetis al Doŝky kaj etendis sian manon, sed Doŝky estis tre okupata per la infano, kiu kaptis lian nazon kaj kruele tordis ĝin.

— Kies infano? — ŝi demandis.

— Por sincere konfesi, sinjorina moŝto, mi ne scias. Hodiaŭ frumatene mi trovis ŝin antaŭ mia barako, sur la vojo, kiu kondukas al oriento. Dumnokte ni havis ian malagrablaĵon. Unu el niaj samĉambranoj malsaniĝis kaj mi ne povis bone dormi.

— Kiu? — demandis subite Johano.

— Dogler.

— Kial?

Doŝky iom meditis.

— Ne grave!... Mi eĉ ne senvestigis min kaj frumatene, por refreŝigi mian kapon, mi iris promeni. Post kelkaj paŝoj min haltigis granda bruna pakaĵo sur la vojo. Mi aliras, rigardas ĝin, kaj vi povas imagi mian surprizon: En varma lana tukego kaj soldata pelto kuŝis tie — tiu ĉi infano. Li estis duone frostiĝinta. Mi kuris kun li al la kuracista barako kaj feliĉe ni baldaŭ sukcesis revarmigi lin.

Johano metis sian manon sur la ŝultron de Petro.

— Tamen vi havas koron, Petro.

La virino rigardis la vestojn de la etulo.

— Mi opinias — ŝi diris — ke la infano estas el bona familio. Almenaŭ la vestetoj estas delikataj.

— Ankaŭ mi tiel opinias.

La virino komplete rigardis la etulon.

— Marusa! Ĉu vi donis lakteton al la infano?

— Jes! — respondis Marusa.

— Alportu ankaŭ Fedja en la ĉambron. Ili bone ludos kune. Marusa iris en la dormoĉambron.

— Ĵus mi volis peti vin, sinjorina moŝto, ke vi prenu sian vian protektadon ĉi tiun malfeliĉan etulon.

Marusa venis kun la malgranda Fedja, kiu vidante la fremdan samaĝulon, ĝoje ekkriis. Marusa sidigis lin apud la alian. La virino Johano kaj Petro dume interkonsilis. Ili decidis, ke la infano restos en la domo, ĝis kiam la gepatroj anoncos sin. Tiel, babilante, kvazaŭ nenio estus okazinta dum la nokto, ili sidigis al la tablo por matenmanĝi. Doŝky ne interesiĝis pri la edzo, la virino ne menciis lin kaj Johano zorge evitis ĉi tiun temon.

En la vestiblo aŭdiĝis botfrapetado. Iu tre zorge frotis la plandojn sur la tapiŝeto.

La virino alkriis.

— Kiu?

En la pordo aperis la humila figuro de Ivan Nikolaevič. Liaj krispaj haroj estis zorge kombitaj, sed la postsignojn de la edzina karesado li ne povis malaperigi. Ili paradis en longaj strioj sur lia vizaĝo. Dum la parolo li kelkfoje balbutis kaj tiam li helpis sin per rapide sinsekvantaj palpebrumoj.

Enveninte li salutis la societeton, poste turnis sin al la ikono en la angulo kaj faris kelkajn kruccignojn.

— Kio nova, Ivan Nikolaevič? — demandis la sinjorino. — Prenu seĝon kaj sidigu al la tablo!

Ivan obeis al la invito kun oftaj klinoj.

La virino pretigis por li tason da teo.

— Trinku, Ivan Nikolaevič! — ŝi diris.

KORO

Apsedels

I.

Manon etendis mi,

petis almozon:

donacu la koron,

al soifanto de amo kaj vero —

la koron! —

Kvazaŭ hakilon en arbon vivantan

vi hakis:

en manon korgrandan orpecon

vi metis:

Foriru, almozulo!

II.

Hodiaŭ krucumis ni

— divenu? —

pugnogradan

ruĝan viandopecon vivantan, —

koro ĝi nomis sin,

homkoro — —

ĝin krucumis ni.

Ĝi — nur imagu! —

Jorrabas liberon,

nin ligas per amo! —

ĝin krucumis ni!

Kaj kiam jam ĉiuj dise foriris,

sur kruco sidigis korvo

kaj iu forĝesis la hundon, —

ĝi lekis la krucon kaj bojis la korvon.

El la latva: R. Eichenbaums.

— Dankon.

Ivan transprenis la taseton da teo kaj verŝis el ĝi iom en la telereton por malvarmigi ĝin. Li trinkis kelkajn glutetojn el la telero, sed vidante, ke neniu trinkas tiamaniere, ankaŭ li imitis ilin.

Longa silento. Ivan trinkis, la aliaj ŝtele rigardis lin. Fine la virino ekparolis.

— Ĉu vi havas ion por mi, Ivan Nikolaeviĉ?

Ivan ekrigardante la virinon profunde ĝemis. La virino interesiĝis plu.

— Ĉu okazis akcidento?

Ivan ektusis, rigardis la du militkaptitojn kaj iom ĝenite komencis la paroladon.

— Mi portis al vi, sinjorina moŝto, ion kaj, la diablo scias, mi tamen ne portis ĝin.

— Nu, ĉi tion mi vere ne komprenas.

— Ankaŭ mi mem ne komprenas. La sinjoro prokuroro bonvolis al mi doni skribon, ke mi transdonu ĝin al vi, sed la skribo malaperis el mia poŝto.

Johano kaj la virino ekridis. La bona homo versaĵne forgesis pri la dumnokta stranga poŝtservo. La virino trankviligis lin.

— Vi jam transdonis ĝin, Ivan Nikolaeviĉ.

Ivan surprizite ekkriis.

— Miii?

— Jes! Vi! Ĉu ne, sinjoro Bardy?

Jes! Jes! — certigis Johano, — Kiam vi hejmenvenis. Ĉu vi ne rememoras? Vi kuŝis sur la tero kaj en akompano de kantado vi transdonis la leteron.

Ivan rememoris malklare kaj ruĝiĝis pro honto.

— Jes! Mi rememoras... Mi estis iom... iom...

— Jes! Jes! Jes! — diris la virino ridetante.

— Vere mi hontas, sinjorina moŝto, ĉar mi ne kutimas drinki, sed hieraŭ, dum reveno, mi renkontis kelkajn kolegojn, kiuj drinkis je la sano de la nova reĝimo kaj ankaŭ mi ili perfortis. Sed mi kraĉas je ili.

— Ĉu ili bruais tiom timige sub la fenestro? — demandis Johano.

— Ĉu ili do bruais?

— Eĉ, kiel?!

— Mi diris ja, ke mi kraĉas je ili. Tiel okazis, ke mi portis la sinjoron prokuroron per veturilo al Tockoesavsk. Pli ĝuste, mi nur pensis, ke ni devas veturi tien, sed ĉe la najbara stacio diras al mi la sinjoro prokuroro: Ivan, vi devas reveni hejmen kaj transdoni tiun ĉi skribon al la sinjorino. Mi ne iros al Tockoesavsk, mi devas iri malproksimen. Nu bone, mi pensas, li vojaĝu, almenaŭ mi ne devas tri tagojn veturi en tia frostoj tien kaj tri tagojn reen. Mi volis tuj reveni, sed la sinjoro prokuroro diris, Ivan, vi devas resti ĉi tie ĝis vespero, por ke neniu eksci, ke mi ne veturis al Tockoesavsk. Nu, bone, mi pensas, kaj je la konto de la sinjoro mi iras en gastejon por varmigi min per iom da vodka. Ni sidas kune, ĉar ankaŭ la sinjoro sidas kun mi, ĝis la plej proksima vagonaro, kiu iras al oriento. Kiam venis la tempo por foriro, la sinjoro donis al mi dudek rublojn, ke mi trinku je lia sano kaj restu en la gastejo ĝis vespero. Mi restis do kaj nenio. Mi ne multe elspezis, ĉar mi volis surprizi mian edzinon. Sed okazis alie ol mi planis... Kiam vesperiĝis...

Ivan haltis en la rakontado kaj transdonis sian tason al la virino, kiu verŝis por li teon. Ivan trinkis glutetojn.

— Kiam vesperiĝis, — li daŭrigis, — mi jungis la ĉevalojn kaj ekveturis. Jam estis tre mallume kaj mi preĝis al Dio, ĉar la sinjoro prokuroro diris, ke dum la nokto povus okazi ia malfeliĉo. Nu, mi preĝis kaj fajfis, ĉar la fajfado estas tre kuraĝiga afero en la mallumo. Nu bone, mi pensis, se okazos io al mi, tiam mi mem estos kulpa pri tio, ĉar kial mi ne restis en la gastejo ĝis mateno. Mi veturis ĝuste tra arbaro. La vojo estis hela, ĉar la luno brilis. Do, mi fajfas kaj fajfas, sed subite mi eksilentas, ĉar jen, renkonte venas alia glitveturilo, sur kiu mi vidas koleregan homon. Li batas la ŝultrojn kaj kapon de la veturigisto preskaŭ en ĉiu momento kaj terure blasfemadas. La veturigisto terure vipas la ĉevalojn kaj la glitveturilo dancante, saltante proksimiĝas al la mia. Mi ektiras la bridojn por eviti la glitveturilon, mi krias al la ĉevaloj „brrr!“ Nu, jam bone, mi pensis, sed la alia glitveturilo haltas apud mi kaj la kolerega viro eksaltas, kaj tenas kontraŭ mi revolveron: „Kiu?“ „li krias. Terure mi ektimis, sed laŭ la voĉo, jen mi rekonas sinjoron kapitanon Medvedjuk kaj mi diras: Ivan Nikolaeviĉ Radĉenko, servisto ĉe la tribunalo. Li enpoŝigas la revolveron. Dank' al Dio, mi pensis, kaj li demandis: „Kie vi estis?“ kaj mi diras, la sinjoron prokuroron mi portis al la najbara stacio. „Nu bone! Plu!“ li kriis al la veturigisto kaj ilia glitveturilo ekkuris.

Mi vidis ankoraŭ, ke en ĝi kuŝis lia edzino kaj ŝi treege ploris...

— Ĉu li forkuris kun sia edzino? — demandis la virino.

Ivan uzante la paŭzeton trinkis longan gluton el sia teo kaj nur poste respondis.

— Nature, kun sia edzino. Li ne kuraĝis lasi ŝin tie ĉi, ĉar oni tre koleras lin kaj facile povus okazi, ke oni venĝus sin je la senkulpa virino kaj infano... Ilia glitveturilo do forkuris kaj mi...

Petro subite interrompis lin.

— Ivan Nikolaeviĉ! Ĉu la vojo kondukas apud la militkaptitejo?

— Ĝuste tra la militkaptitejo.

Johano rigardis al Petro kaj tuj divenis lian penson. Ankaŭ la virino havis la saman penson kaj jam preskaŭ ekparolis, kiam Petro metis averte la fingron sur sian buŝon. Stranga ekscitiĝo regis ĉiujn tri.

Dume Ivan rakontis plu.

Petro tion jam ne aŭdis. Li vidis antaŭ si la kuregantajn glitveturilon, kiu dancskuiĝante glitas en la nokto al nekonata celo. Ĝi subite eksaltas kaj la infano, vindita en varmaj lantukoj kaj dika soldatpelto, falas el ĝi kaj restas sur la vojo. La patrino lacigiĝe pro la ekscitiĝoj dormas profunde.

BALADO

kiun la poeto verkis pri la rido trila de sia brila Ora Sonorileto.

*De viaj lipoj fluas flute
Trilanta rido; kaj la sono,
En ardvespera monotono,
Perladas dolĉe, balzangute.
Ho estu al vi danktribute
Ĉi naiveta panegir'
Kantata sur maljuna lir',
Sed freŝe vibru en ĉi horo
La rusta kord' je via gloro:
Jen mia provo kaj sopir'!*

*Se ridas vi, la parko mute
Aŭskultas pri la ora tono,
La najtingalo-primadono
Jam trilas pro l' envi' balbute.
Ektremas la branĉar' kaj ŝute
Aljetas florojn en admir',
Petegon portas la zefir',
Lilioj flustras per odoro:
Plu trilu al ni kun favoro,
Jen nia ravo kaj sopir'!*

*Elvenas Luno kaj salute
Ridetas ĝi al la balkono,
Premie pro la ridkanzono
Vin en arĝenton vestas tute...
Ho, kial daŭras nur minute
Kaj nekapeble per dezir'
La sorĉa, pura eliksir',
Plezura, dolĉa trilsono:
Eterna estus ĝia oro:
Jen mia revo kaj sopir'!*

DEDIĈO

*Princin' de l' koro, de l' Inspir',
Jen la balad' kun ritma spir'!
Se plaĉas ĝi al vi, trezoro,
Akceptu ĝin (kaj min) ĉe l' koro,
Ho mia Vivo kaj Sopir'!*

K. DE KALOCSAY

— Ĉu vi venis tra la militkaptitejo? — demandis Petro la rakontanton.

— Ne, ĉar por mi estas pli proksime preter la garnizono.

Petro en sia fantazio plektis plu la fadenojn de la nokta okazintaĵo. Li vidis antaŭ si la dolore mildan vizaĝon de la patrino, kies martira vivo tiel ofte kortuŝis lin en tiu tempo, kiam Medvedjuk loĝis kun sia familio en la tendaro. En tiu tempo naskiĝis la etulo, kiu nun sidas tute orfe tie sur la kanapo.

Li denove demandis Ivanon.

— Ĉu vi ne vidis ilian infanon en la glitveturilo?

— La diablo scias. Ilia glitveturilo kuregis, kvazaŭ ĝi estus havinta flugilojn kaj tuj malaperis en la mallumo.

Ivan rakontis kaj Petro meditis.

Li sentis ne reteneblan sopiron helpi al tiu malfeliĉa virino, kiu estas por ĉiam katenita al tiu homa bruto. Li imagis sian ĝojon, kiam li transdonos la infanon al ŝi, eble post kelkaj jaroj, li vidis kiel li forviŝos la ĝojlarmojn de la patrino. Li sentis, ke en lia vivo ŝi estas la unua virino, kiu vekis en li pli ol simpatian.

Ivan trinkinte la lastajn gutetojn levigis de la tablo kaj finis sian historion.

— Ni venis el la gastejo, tion mi scias, ni ankaŭ kantis, certe, kiam ni ekiris, ni kantis. Sed kiel mi hejmen venis, tion mi tute ne povas diri. Ne koleru min, sinjorina moŝto, sed vere mi estas senkulpa... Mi ne volis, sed oni perfortis min. Mi ne ŝatas drinki. Je mia honora vorto!

— Nu bone, bone, Ivan Nikolaeviĉ! Nenio okazis! Vi plenumis vian komision, vi transdonis la leteron kaj nenio pli... Ĉu ne?

Ivan prenis sian felĉapon kaj estis forironta kun oftaj sinklinoj. Sed la sinjorino haltigis lin.

— Ivan! Glaseton da vodki!

La okuloj de Ivan ekbrilis sed protestante li skuis la kapon.

— Ne, ne, sinjorina moŝto. Mi ne drinkas...

— Nu, Ivan... — instigis lin la virino.

Ivan, kion fari, kapitulacis.

— Se vi perfortas, sinjorina moŝto... — li diris kaj etendis la manon al la glaseto da vodki, kiu havis gustum-

indan flavan koloron pro la enmetitaj citronŝeloj. — Je via sano, je la sano de la estimata sinjoro prokuroro kaj je la sano de liaj estimataj moŝtoj amikoj...

La virino verŝis en alian glaseton kaj proponis ĝin al Johano.

— Ĉu vi volas, Johano Juroviĉ?

— Dankon! Neniam!

— Ĉu vi, sinjoro Doŝky?

— Dankon! Ĉiam! — ridetis Petro kaj trinkis.

Ivan ankoraŭ trinkis unu glaseton je la feliĉa reveno de la edzo, unu glaseton je la feliĉa hejmeniro de la militkaptitoj kaj poste, profunde klinante sin, foriris.

Kelkminuta silento. Petro sidigis al la ludantaj infanoj kaj kompare rigardis ilin. Johano okupis sin per siaj pensoj, kiuj vagadis denove ĉe la forlasita hejmo. La virino karesis la kapeton de sia fileto.

— Li estas do la fileto de kapitano Medvedjuk! — ŝi diris.

— Jes! De la tigo, — respondis Doŝky.

— Kial vi avertis nin por silentado? — demandis Johano.

— Mi ne volis, ke tiu ĉi babilema kamparano eksciuj, ke la filo de la tigo estas ĉe mi. Tio estus danĝera por la etulo. Eble iu vandalo...

Petro subite eksilentis, kvazaŭ kaptite de nova ideo kaj rapide prenis sian mantelon. Johano kaj la virino mirigite rigardis lin.

— Kien? Kien? — demandis lin Johano.

— Hejmen!

Kaj li jam vestis la infanon kaj kisis la manon de la virino. Ŝi estis tute surprizita.

Petro dankis la gastamecon kaj kun la infano sur la brako li ekiris al la vestiblo. Tie li haltis momenton kaj turnis sin al ili.

— Mi petegas, sinjorina moŝto, al neniu vi diru, ke la fileto de la tigo estas ĉe mi. Al neniu!

Johano iris al sia amiko kaj retenante lin demandis.

— Kio estas al vi, Petro?

Petro post iom da konsidero, kun malgaja rideto, respondis.

— Nenio, Johano, sed mi pensas, ke ankaŭ mi komencas konstrui karlfortikajon sur songfundamento.

Kaj preskaŭ kurante, li malaperis.

ARTO KAJ ARTISTOJ

PAULO VARSÁNYI: TRI HISPANAJ PENTRISTOJ



La historiaj valoraj de Hispana arto eliĝas tri nomoj, ĉefaj reprezentantoj de l' nacia spirito: *Greco*, *Velasquez* kaj *Murillo*. Iliaj bildoj prezentitaj en ĉi tiu numero, estas netakseblaj trezoroj de la fama hispana kolektaĵo de l' Muzeo de l' Belaj Artoj en Budapeŝt. Pro manko de loko, anstantaŭ detala konigo, ni devas resumi nur la plej gravajn informojn pri ilia kreado.

La spirito de l' Kontraŭreformacio kunligis Hispanion kaj Italion, kies plej konservativa urbo, *Venecio* ofte estis vizitata de la hispanaj pentristoj. Sed la profana vivigo de l' Renesanco tie estis ekzilita; la religia kredo pliigis ĝis la plej arda mistikismo; la homoj kun neestingebla soifo ĵetis sin en la religiajn revadojn. La arto — kvankam ĝenerale religia — estis antaŭ novaj problemoj: ĝi devis okulvideble esprimi, kiel baraktas en korpaj katenoj la animo sopiranta ĉielajn plezurojn, kaj ĝi devis realigi la mondon de l' religiaj vizioj, prisionĝitan en sinforgesa stato de religia ekstazo.

La efiko de ĉi tiu mentaleco komence ne estis sentebila en la arto; ĝi ankoraŭ ne havis la necesajn teknikajn ilojn de l' esprimo. Estas mirinde, ke fremdlanda artisto estis, kiu plej profunde eksentis la animon de l' popolo kaj ankaŭ laŭ arta enhavo — valora ĉefe en nia tempo — esprimis

ĝin plej bele en siaj verkoj: tiu estis la grekdevena *Greco* (Kiriotos Domenico Theotokopuli).

Li naskiĝis en *Kandia* — ĉefurbo de l' insulo *Creta* — ĉirkaŭ 1547, lia vivo ne estas sufiĉe konata, grandparte mistero ĉirkaŭas lin. En la jaro 1570. — inter nekonataj cirkonstancoj — li vojaĝis Venecion kaj tie li iĝis disĉiplo de *Tiziano*. En liaj bildoj tie kreitaj estas sentebaj la efiko ankaŭ de *Tintoretto* kaj *Palma*. En 1576. li ŝipveturis Hispanion kaj loksidiĝis en *Toledo*. Li mortis tie la 7-an de Aprilo 1614.

Liaj plej multaj bildoj nuntempe estas en la *Madrid' a Prado* kaj en *Toledo'* aj preĝejoj. En la *S. Tomé* estas videbla la *Enterigo de grafo Orgaz*, unu el la plej famaj kreaĵoj de *Greco*. Ĉi tiu bildo konsistas el du partoj: la mal-supra parto prezentas al ni la enterigon kaj la supra la akcepton en la ĉiela kortego. *St. Aŭgusto* kaj *St. Stefano* tenas la senvivan korpon de la grafo, ĉirkaŭate de funebranta amaso de pastroj kaj nobeloj. Supre ni jam vidas la grafon en la ĉiela regno, antaŭ Kristo, *Virgulino* kaj feliĉuloj, petanta eniron. La figuroj estas fantomaj, askete ellongigitaj; la reala kaj la transcenda miksiĝas ĉi tie en tiel timige sovaĝa patoso, ke multaj artkritikistoj supozis, ke *Greco* perdis sian menson kaj en tiu tempo li jam estis *irenezulo*.

Laŭ la supozo de *Theophile Gautier* Greco timis, ke oni kredos lin imitanto de Tiziano — kaj ĉi tiu manio pelis lin al la plej strangaj fantasmagorioj. Nia tasko ne estas esplori ĉi tiun demandon. Ni povas konstati nur, ke ĉi tiu bildo de Greco iĝis antaŭpeco de la hispanaj viziaj bildoj.

La arton de l' XVI. centjara Hispanio ĝenerale karakterizas la transplantado de l' itala *klasikismo*; la efiko estas facile rimarkebla en la skoloj de *Sevilla*. Sed grava ŝanĝiĝo sekvis en la komenco de l' XVII-a jarcento: per la bildoj de *Ribera*, vivinta en Neapoli, metis sian fundamenton ankaŭ la *naturalismo*.

La pentristoj de ĉi tiu epoko multe meditadis pri la vera arto kaj tiel ili estis fidelaj sekvantoj de la italaj majstroj. *Pacheco* verkis libron pri artaj demandoj: *La pentrarto, ĝia antikveco kaj grandeco*, Sevilla, 1649. En ĉi tiu libro *Pacheco* primemoras siajn samtempojn kaj laŭ valoro — post *Romulo Cincinato* kaj *Rubens* — li donas la trian lokon al *Velasquez*.

Post la studjaroj ĉe *Herrera*, *Velasquez* (1599—1669) venis en la atelieron de *Pacheco*. „*Diego de Sylva Velasquez* — diras *Pacheco* — mia bofilo, posedas la trian lokon, kun plena rajto. Post la edukado kaj instruado, daŭrintaj 5 jarojn, mi geedzigis lin kun mia filino, ĉar estis je mia ĝojo lia virteco, afableco kaj simpatia karaktero, krome la espero, kiun estigis lia granda talento gajnita de la *Naturo*. Ĉar la majstro havas pli grandan gloron ol la bopatro, mi kredis justa rifuzi la kuraĝegon de iu, kiu volis alproprigi ĉi tiun gloron kaj forrabi la kronon de miaj lastaj jaroj.“ (Versajne *Herrera*.) „Mi ne hontas, ke la disĉiplo superis sian majstron, — mi diras nur la veron, kia ne ekzistas pli granda.“

En la aprilo de la jaro 1622. *Velasquez* venis el *Sevilla* *Madridon*, jam delonge dezirinte vidi la *Escorial-palacon*.

Ĉi tie li vidis ĉevalan portreton de *Karlo V.* pentritan de *Tiziano*, kiu faris al li grandan efikon. Per la propeto de *Pacheco* li pretigis la portreton de la poeto *Don Luis de Gongóra* kiu ekiris por li ĝeneralan sukceson. Li tre deziris pripentri ankaŭ la reĝan paron, sed li ne sukcesis iri en la kortegon. En la jaro 1623. *Don Juan D'Austria* — la onklo de *Filipo IV.* — laŭ la ordono de ĉefministro *Olivarez* prenis lin en sian favoron kaj ankaŭ sian portreton pretigis per li. „La saman tagon vespere la filo de grafo *Peneranda*, ĉambelano de la infanto-kardinalo, forportis la bildon en la palacon kaj post unu horo vidis ĝin la tuta kortego, la infanto kaj la reĝo, kio estis la plej granda distingo.“ Poste li pretigis la ĉevalan portreton de *Filipo IV.* „plene laŭ naturo, ĝis la pejzaĝo de l' fono“. „Admiris ĝin la tuta kortego kaj tre enviis lin la artistoj.“ Oni verkis pri ĝi multajn laŭdajn poemojn kaj li iĝis la plej festata pentristo. La reĝo „donis al li atelieron en sia galerio kaj ankaŭ li mem havis al ĝi ŝlosilon kaj apogseĝon en ĝi, por vidi laŭ sia emo, kiel li pentras, preskaŭ ĉiutage. La plej granda grado de l' reĝa favoro estis, ke, kiam *Velasquez* pentris tiun ĉevalan portreton, li sidis por ĝi 3 horojn sen interrompo, devigante al tio sian viglan naturon kaj majestecon“.

Ĉi tiuj citaĵoj — ĉerpitaj el la libro de *Pacheco* — sen troigo montras la popularecon de *Velasquez* kaj la admiron, ne malpli grandan.

Murillo (Bartolomé Estéban, 1617—1682) estis la fondinto de l' skolo de *Sevilla*. Dum 1642—5 li estis en *Madrid*, kaj per la helpo de *Velasquez* studis tie la arton de *Rubens* kaj *Tiziano*. En 1660 li iĝis gvidanto de l' akademio en *Sevilla*. Lia arto, same kiel tiu de *Velasquez*, havis sian radikon en la *naturalismo* de *Sevilla*. Liaj genrobildoj: „*Melonmanĝantaj knaboj*“, „*Ĵetkubladantoj*“ (en *München*)

montras lian grandiozan kapablon por percepti la formojn de l' realo. Ĉi tiu *naturalismo* esprimiĝas eĉ en liaj viziaj religiaj bildoj, kiuj impresas nin de pli efike.

Tre interese estas kompari liajn bildojn kun tiuj de *Greco*. *Greco* la realon subordinis al la formoj de sia fantazio; li „elongigas la korpojn de l' ĉielaj loĝantoj, li vidas ilin similaj al la flamoj“; * liaj sanktuloj efektive estas enkorpiĝintaj spiritoj, al ni fremdaj, ne el niaj karno kaj sango; el ili ŝajnas manki la animaj signoj de l' sekseco: ili estas kvazaŭ neŭtralaj. Tian transcendan mondon *Murillo* ne povis atingi; sed liaj bildoj pro tio ne estas malpli grandiozaj; li restis ĉiam inter la teraj mezuroj kaj eĉ liaj plej patosaj viziaj bildoj, ĝuste pro siaj *naturalismaj* eksterajoj, montras komunecon al nia vivo: ili respogas la idealigitan staton de l' enharmoniĝintaj, belaj korpo kaj animo.



VELASQUEZ :

MATENMANGANTAJ KAMPARANOJ

* Maurice Barrés: Greco.

OBSERVO

A P S E S D E L S



En la latva literaturo specialan lokon okupas nuntempa poeto-individualisto: Apsedels. Li, unu el plej elokventaj individualistoj de l' nuntempo, estas tute aparta, tute sola, laŭ la plena senco de l' vorto. Severa kritikanto, kuraĝa kreanto kaj sprita disputanto, li akiris multajn malamikojn, dum amikojn — li tute ne havas. Neniu li estas videbla kune kun alia homo, kun neniu li interparoladas. Strange vestite, nudkape, kun longa ruĝa barbo, li estas kvazaŭ fantomo glitanta tra la stratoj de l' cefurbo dum krepuskaj horoj. Li rigardas nenien, kvazaŭ vidas nenion. Kaj tra la publiko kuras murmuro — „Apsedels“! Ĉiuj konas lin, multaj ŝatas liajn verkojn, sed li restas fremda por ĉiuj. Kial? La solvon oni devas serĉi en lia literatura agado.

La nuntempa socio emas ĉiun apartenigi al iu grupo — ĉu politika, ĉu ekonomia. Kaj nur laŭ ĉi tiu aparteneco oni juĝas iun personon ŝatinda, aŭ malaminda. Kaj tial ĉiuj juĝoj de la nuntempo estas ne nur ridindaj, sed preskaŭ ĉiam ankaŭ maljustaj, nia kulturo marŝas al abismo, ĝi ne plu estas kulturo, sed barbarismo. Jen la unua punkto, kontraŭ kiu batalas Apsedels. Kaj tute kompreneble, plejparto de liaj vortoj ĉi rilataj trafas la burĝan parton de la socio. Tial ĝi rigardas lin sia malamiko, nomas lin „apologisto de la proletario“. Sed Apsedels, idealisto kaj konsekvenca logikulo, ankaŭ al ĝi ne povas aparteni. Ankaŭ tie li ekvidas malĝustajojn, malverojn, kulpojn, ankaŭ tien li turnas sian kritikon, sian mokon. Do ankaŭ tie oni lin trovas sia malamiko, oni nomas lin anarkisto. Jen jam du malĝustaj juĝoj, kaj tiaj estis sennombraj, ĝis fine Apsedels troviĝis laŭ la juĝoj ekster ĉiuj grupoj de l' socio. Kaj fine alvenis la ĝusta juĝo: „li estas individualisto!“

Kia do estas la mondrigardo de Apsedels?

Kiel solan valoron de l' Tero, kiel centron de ĉio li rigardas la homon. Li estu la reganto de l' mondo! For ĉiajn barojn antaŭ li! Sed por tio li devas vere esti homo, laŭ la vera senco de l' vorto. Ne plu besto, ne plu sklavo, ne plu estaĵo stampe registrita al io ajn, ĉu ĝi estu politika partio, kultura aŭ ekonomia asocio, religio ktp. Liaj juĝoj estu liberaj, li agu laŭ sia vidpunkto kaj la celo de lia agado estu kulturo, tutmonda, tuthomara! Jen la programo, ĉirkaŭ kiu kuras la fadenoj de liaj pensoj. Justaj kaj ĝustaj juĝoj pri la nuntempa stato de la socio, kuraĝa malkovro de ĝiaj mensogoj, krimoj, malĝustaj vojoj — jen la enhavo de liaj poemoj. Iliaj elokventoj estas malfacile kontraŭdiri. Bedaŭrinde, kion oni ofte vidas ĉe reformistoj, la kritika, kondamna, detrua parolo de lia verkaro estas pli evidenta, pli nerefutebla ol la konstrua, novkrea.

Ankaŭ rilate la formon Apsedels estas individualisto. Li ne uzas formojn, ne uzas vortojn jam uzitajn, li kreas ion novan. Li estas ŝatata de la legantoj kiel kreanto de novaj valoroj. La nuntempa latvan poezion li detenas iom de la ŝablonismo. Pro li estis rompitaĵ multaj plumoj, sed neniu el ili tuŝis lian koron. Li estis kaj estas — Apsedels, aparta roko en la montaro de la nuntempa latva poezio. R. Eichenbaums.

JOHN DRINKWATER

(elparolu Ĝon Drinkwater) kvankam ankoraŭ juna (li naskiĝis en 1882), jam akiris al si grandan famon kiel moderna poeto dramverkisto. Li eldonis sian unuan verkon de poeziaĵoj en 1908. Kun aliaj li fondis la „Pilgrim Players“, „Pilgrimantaj Ludantoj“ kaj poste fariĝis direktoro de la Birminghama Repertory Theater kiun li direktis kun granda distingo dum multaj jaroj. Liaj teatraĵoj „Abraham Lincoln“, „Oliver Cromwell“ kaj „Robert E. Lee“ kun aliaj famigis lin inter la angla publiko en sia hejmlando kiel en Usono. La teatraĵo kiu aperas tie ĉi, la unua traduko en la Esperanta lingvo el liaj verkoj, estas aparte interesa al la Esperantistoj pro ĝia interna ideo kaj spirito. Ĝi estis prezentita unue en 1917, dum la milito, en Birmingham sub la direkto de la aŭtoro mem. J. D. A.

ZOLTÁN KODÁLY

Atente observante la evoluon de la muziko je la fino de la pasinta jarcento, oni facile rimarkos ke ĝi estis frukto tromaturo. La principoj, sur kiuj ĝi estis bazita, estis ekspluatitaj, oni tiris el ili la lastajn konkludojn, plua progreso ŝajnis neebla, eĉ ne imagebla. Oni dubis: ĉu estas eble komponi operon post Wagner, simfonion post Bruckner kaj Mahler, kaj estis ankoraŭ aliaj demandoj, ĉiuj kun respondoj neantaj.

La rimedojn de l' savo trovis la tiamaj francaj komponistoj; ili reiris el la tromaturiginta civilizacio al la freŝa naturo

patrino. En la muziko tio signifas: oni forlasu la ĝisnunan fundamenton kaj observu kaj studu la kantojn popolajn. Ĉi tiu principo naskis la folkloran movadon. Ĉe popolo, kies malnova popolmuziko apenaŭ estis ĝis nun esplorata, ĝi promesis riĉan rezulton. Kaj vere, ĉi tiu principo donacis al ni inter aliaj la modernan francan muzikon, kiu tamen — pro kaŭzoj kiujn mi nun ne povas pritrakti pro manko de loko — ne savis la universalan muzikon *rekte*, sed nur *pere*, intercetere per la du grandaj komponistoj hungaraj: Bartók kaj Kodály, kiuj ambaŭ ricevus valorajn impulsojn de ĝi. Num ni vidu la duan.

Kodály (1882-) komence sin preparis por scienca kariero, muzikon li ne lernis sisteme. Tamen frue montriĝis lia talento de komponado. Fruaj fruktoj: kelkaj verkoj de ĉambromuziko, uverturo (1897!) kaj unu Meso.

En 1900 li vojaĝas Budapeŝton por viziti la filozofian fakultaton. Tiam li jam intense lernas muzikteorion.

Tiutempe atingis Hungarion la ondoj de la folkloro movado. Kodály kaj Bartók fervore sin decidis al la studado de l' popolmuziko. Baldaŭ rekonate ke la tiel nomita hungara (cigana) muziko konsistas nur el plimalpli trivialaj kantoj artefaritaj, ili ekserĉis la veran hungaran muzikon inter la popolo, en la plej netuŝitaj partoj de la lando. Kaj la rezulto estis grandioza. Miloj da kantoj, multaj jam nur en memoro de maljunulinoj, estis ankoraŭ troveblaj, kaj trovitaj vere en la lasta momento.¹⁾ Multcentjaraj, paramaljunaj kantoj.

Sed al li la laboro alportis ankoraŭ pli altvaloran rezulton: la fekundigon de lia spirito, kio manifestis sin en forta fermentado. Al la interna riĉeco baldaŭ aliĝis la direktilo de la sperto. Dum sia eksterlanda vojaĝo (1906—1907) li ektrovas la trezoron de la moderna muziko franca (Debussy), kiu lin influis en la unua periodo de lia evoluado.

De 1907 li estas profesoro de l' Muzikakademio en Budapeŝt.

Lian nomon faris konata unue la simfonia poemo: *Somera Vespero*, kaj kelkaj pianoverkoj. Poste li turnis sin al alia branĉo, al la ĉambromuziko. Kaj en ĝi — li pruviĝis ĉiopova suvereno. La individua karaktero de la ĉambromuziko — rezulto de libera unuigo de instrumentoj — tre konvenis al lia profunde sentema naturo, kiu sin manifestas en mirinde pura, sed vive subpremata lirismo. Ekde la unua arĉkvarteto li klopodas atingi la plej grandan intensecon de l' esprimo kaj enhavo, la rimedojn uzitaj ĉiam pli kaj pli malpliigas, (*Sonato por violonĉelo kaj piano*, *Duo por violonĉelo kaj violono*) ĝis fine li forjetas ĉion ne nepre necesan sin limante je sola violonĉelo, en la majstroverko: *Sonato por violonĉelo-solo*. En ĝi regas la plej granda perfekteco: plena libereco de l' esprimo en formo plene unueca. Sekvis: la dua kvarteto kaj serenado por arĉtrio.²⁾

Intertempe li plugadis la humon de l' popola muziko. Ĝia profundeco, sana forto, riĉaj ritmoj, ŝpruceanta melodia fonto ricevis veran apoteozon en liaj kantoj. En kelkaj jaroj li — ununura viro — rekreis la hungaran muzikon de l' pasinteco. La tekstojn li prenis el malnovaj poetoj, motivojn li uzis popolajn, ornamante ilin per la admirinda, riĉe orbrodita mantelo de l' akompanaĵo, farita el ŝtofo de sonoraj harmonioj modernaj. Li komponis ankaŭ poemojn de Ady. La kanto kun orkestra akompano „*Plori, plori, plori*“³⁾ estas grandioza rekreo de la preme streĉita poemo. Malhelaj basoj, tremo brilo de marĉlumoj sur la lignaj blovinstrumentoj, abunde riĉaj tonkoloroj, kuntrenanta mistika patoso solviĝas fine en la korŝiraj lamentoj de flutriloj kaj terĉpasajoj.

Lia fortika fundamento etika kaŝis en si la ĝermon de admirinda frukto, per kiu li alvenis al la vera monumentaleco. Ĝi estas la „*Psalmo hungara*“ (55-a psalmo) por ĥoro, tenorsolo kaj orkestro, komponita laŭ malnova traduko el la 17-a jarcento. Verko kun tremige frapanta efekto, admirinde perfekta laŭ enhavo kaj formo, elpenso kaj efektivo. Plej frapanta tamen en ĝi estas la tute nova priuzo de la homa voĉo, per kiu la komponisto atingis ĝis nun nekonatajn, mi povus diri, metafizikajn efektojn. Ĝi estas ne nur la plej granda verko de la hungara muziko, sed laŭ mia kredo sendube ankaŭ unu el la plej gravaj de la tuta muzikliteraturo.

Liberaĵ malproksimoj, revemaj meditoj, profundaj pripensoj, grandliniaj, jen reve ŝanceliĝantaj, jen pasie eksvingitaj melodioj, pompa florado de tonkoloroj — jen la muziko de Kodály. Kaj tia matureco, tia atingo de supro, tia nepra dispono pri ĉiuj ebloj de esprimo, ke la admirantoj spiriretene atendas, kiajn abundajn fruktojn disjeto la nun jam mondfama majstro el la riĉa profundo de sia koro. Karlo Lovasi

¹⁾ Unu volumo aperis ankaŭ france kaj angle.

²⁾ Ili estas eldonitaj de la mondfama „Universal Edition“ (Vieno).

³⁾ Vidu L. M. III. 8. 133.

LET E R K E S T O

L. K-ANO. Vi rekte demandas nin, kion ni opinias pri la Nov-Esperanto de sro de Saussure. Ne tre volonte ni respondas, ĉar tiu ĉi demando estas ekster la kadroj de nia agosfero. Ni uzas la lingvon, do problemo por ni povas esti nur ĝia uzebleco kaj ne ĝia teoria perfekteco en tiu aŭ alia rilato. Ni estas konvinkigitaj ke tia perfekteco estas relativa kaj, ĝuste pro tio, ĝia serĉo kondukas nur al diskutoj kaj disputoj, sed neniam al definitiva, do *uzbla* lingvo. Sro de Saussure kreis kvin aŭ ses projektojn, ĉiujn li deklaris definitiva sisteme, multfoje tre akcente, unufoje eĉ kun la garantio de la Esperantida Akademio. Kaj, dum la malfeliĉa „Virineto de l' Maro“ faris siajn metamorfozojn unu post la alia, la Esp. literaturo bele riĉiĝis. Kaj ĝi espereble ankoraŭ riĉiĝos, dum la suprenomita fabelo daŭrigis siajn metamorfozojn.

Sed sen serĉo! Zamenhof multaj batalis sisteme kontraŭ reformuloj. Fine ili ekŝiĝis, aniĝis al aliaj projektoj kaj — de tiu tempo vivas Esperanto. Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj — jen la granda danĝero por artefarita lingvo. Kaj el ĉi tiu danĝero la sola eliro estas, se ni povas diri diktatore: „jen la internacia lingvo, ĝi ekzistas, ĝin parolas miloj kaj miloj da homoj, kiuj tute ne scivolas pri via persona gusto kaj prefero. Se ĝi ne plaĉas al vi, mi kompatas vin, ke vi devas uzi lingvon, kiu al vi ne plaĉas. Cetere — trankviliĝu, vi alkitimiĝos“.

Tia parolo, nun, post la multaj sukcesoj de Esp., estas pli ebla kaj malpli ridiga, ol en la unuaj tempoj. Kaj kiam ĝi estos tute memkomprenebla — tiam venkos Esperanto.

Sed komenci nun denove diskutojn pri la formo de multenombro? Tiu forigis la skismon? Kian skismon? La idistan certe ne, ĉar la *Esperantida* estis multe pli simila al Ido ol Nov-Esperanto kaj idistoj tamen ne tumultis sub ĝian blankstelan standardon. „Occidental“, „Medial“ kondamnas tiajn ecojn de Esp. kiuj ekzistas ankaŭ en Nov-Esp. Skismo ne foriĝis, sed fariĝis. Ĉar ni estas certaj, ke eĉ se L. K. akceptus la reformon, granda parto de esp. istoj elektus por si — alian L. K. Ankaŭ mi mem. Mi tute ne emas, pro kontestablaj plibonigoj, transskribi miajn verkojn, traduki ree miajn tradukojn.

Jes. Esp. estas jam „nenies proprajo“, al ĝia anaro neniu povas trudi reformojn, ĉar neniu havas plenan potencon super tiu ĉi anaro. La Akademio ekzemple akceptis la formojn *ankore*, *anke*, kaj — neniu uzas ilin, la plejmulto eĉ ne scias pri tio. Ni havas jam *amason* esp. istan kaj la konservativemo de la amaso certe malhelpos — dank! al Dio — ĉian danĝeran eksperimenton.

Sro de Saussure havas grandegajn meritojn. Liaj principoj „sufiĉo kaj neceso“ estas la trezoro de Esperanto. Lia vortderiviva sistemo, kvankam ne oficiala, estas la vivanta parto de la lingvo, per ĝi li fariĝis kvazaŭ ĝia kunkreinto. Nur de post liaj klarigoj oni vidas la grandan superecon de Esperanto al Ido, oni povas diri ke bone konante tiun ĉi sistemon oni bonafide ne povas esti idisto.

Estas tre bedaŭrinde ke sian grandan talenton poste li uzis ne por la *ebla* pliperfektigo, t. e. *kompletigo* de la lingvo, sed por ĝia *ne ebla* pliperfektigo, t. e. *reformo*. Longajn jarojn li laboris tre fervore, tre science, tre sprite — kaj tre senrezulte. Li havis vere genie spritajn trovaĵojn, por forjeti ilin en la sekvinta projekto. Kaj nun li preskaŭ tute revenis al sia Antido-projekto publikita en la jaro 1911.

Ĉar Nov-Esperanto estas pli proksima al Esp. ol ĉiu el la Esperantidaj projektoj. Ĝi diferencas de Esperanto nur en kvar punktoj: 1. manko de supersignoj, 2. multenombro kun *n*, 3. akuzativo kun *u*, 4. sistemo de prepozicioj.

La manko de supersignoj estus ja bona, se ĝi ne postulus sufiĉe grandajn ŝanĝojn en la vortaro. Sed tiel? Ĉu la perdo (la devo lerni novajn vortformojn) valoras la gajnon? Nun kiam ĉiam pli kaj pli multaj presejoj jam havas la literaron. Kaj ĝin ja havos ĉiuj presejoj post la oficiala akcepto nepre. Kaj ĝi ja estas la plej perfekta fonetika sistemo.

La multenombro kaj akuzativo estas ŝanĝitaj pro kaŭzo de belsoneco. Nu, tiu ĉi belsoneco estas relativa, dependas de gusto, kaj de tio, ĉu oni rigardas la lingvon el ekstere, aŭ oni vivas en ĝi. Mi ne volas paroli pri la greka lingvo: „O popoi, hoion de nū theous brotoi aitiontai“. Sed al mi vere pli plaĉas: „La monotonajn trilojn de la griloj“ ol „la monotonan trilon de la grilon“. La terure multaj *n* kun sia seka, scienca, senaroma, obtuza sono komence enuigas, poste faras min vere nervoza. Ĉi tiun efikon ankoraŭ pligrandigas la oftaj *u*, kun siaj surdaj ekbatoj. Krome — estas kontraŭ mia pensmaniero ke la akuzativa finaĵo antaŭas la pluralan. Laŭ mia opinio ne „homon“ havas pluralon, sed „homoj“ havas kazon akuzativan.

La sistemo de prepozicioj estas tre sprita kaj perfekta, pli bonan, pli matematike ekzaktan sistemon oni apenaŭ povus krei. Sed ĉu tiu troa ekzakleco estas rekomendinda en lingvo? Ĉu ĝi ne pli evidentigas tiun ĝian artefaritecon, kontraŭ kies ŝajno ni luktas en nia literaturo? Kaj, strange, tiaj tro regulaj partoj de la lingvo eĉ ĝian lernon ne faciligas. Ĉiu kursgvandanto spertis tion ĉe la Tabelo.

Sed ĉi tiu pritraktado havas nur akademian signifon. La projekton ni trovus neakceptinda, eĉ se ĝi ĉiurilate estus senduba plibonigo. Nia zorgo ne estas plu la strukturo de la lingvo, por ni ĝi estas definitiva, preta. Ni ja estus vere ridindaj, se ni volus evoluigi literaturon en lingvo, kiun oni morgau eble ŝanĝos ĝis nerekonlebleco. La stilo, jen nia sola zorgo, ĝin ni volas evoluigi ĝis tia nuancriceco, ke ĝi neniam restu malsupera al la naciaj lingvoj. Dum ĉi tiu evoluo ja povas okazi malgrandaj ŝanĝetoj, sed ili venos iom post iom, kvazaŭ nerimarkeble, kaj propre eĉ ne estos ŝanĝoj, nur riĉigoj. La belsoneco de Esp. estas por ni senduba, por alkitimiĝo ni sentas nin el la lingvo hejme kaj ĉiu nenatura ŝanĝo frapas nin malagrabla, kvazaŭ stranga, slanga malperfektaĵo. Ĉu la lingvo, aŭ iu ĝia vorto estas perfekta laŭ diversaj konsideroj (kiuj cetere tre ofte kontraŭdiras unu la alian) tio tute ne interesas nin. La kapricojn, malglataĵojn ni rigardas simple specialaĵoj, kiujn artisto povas uzi siaj celoj. La francojn ne ĝenas ke ili devas diri „mi ne manĝis paŝon“ kaj „kvardudekdek“ anstataŭ „mi ne manĝis“ kaj „naŭdek“. Ankaŭ nin ne ĝenas strange faritaj vortoj, kapricaj reguloj, ni scias pri ili „teorie“, sed ni ne rimarkas ilin „praktike“, dum la uzo de la lingvo. Nur laŭ tia sento de la lingvo ni povas diri vere, ke Esp. estas vivanta lingvo. Kaj ĉi tion ni diras kaj laŭ ĉi tio ni agas!

Ni ne komprenas ekzemple la antipadon de sro Stojan kontraŭ la oficiala (kaj Zamenhofa!) vorto „abismo“. Ĝi estas Esperanta vorto — kaj finite! Kiun interesas plu, ĉu ĝi estas perfekta laŭ internacia etimologio?

Por fini — ni ĝojas pri ĉiuj apartaĵoj, ĉar ili estas esperantismoj, do pruvoj pri la memstara vivo de la lingvo.

Kaj pri Nov. Esp. ni certe scias ke ĝi restos projekto.

Kopar.

Nepublikotaj manuskriptoj. Garibaldi kaj la Idealo. Nekonatinato. Ĉe la limo. La heredajo. (Ni jam tre multe publikis de la sama aŭtoro.) Pakajo el Usono. (La stilo estas tre vigla, sprita, bongusta kiel ĉiam el la sama fonto, sed la situacion saman iom troe eluzis Kristiano Mallerta.) La ermito. (Ni longe hezitis pri la belega novelo, sed — ni ne kuraĝas riski. Multajn indignojn ni jam amasigis super nia kapo kaj ni ne povas esti sufiĉe singardaj.) Al suproj. (Ni havas tro multe da tiaj „poemoj en prozo“. La samo rilatas ankaŭ al Sunleviĝo. La heroo. Duesenca vivo. Tio ĉi atendas vin. Preĝo de patrino. Balado. Kosma romano. (Tre malfacile komprenebla traduklingvaĵo.) La neevitebla blankulo. (Ne reprezenta verko de la aŭtoro.) Patriotismo. (Belaj ideoj, tre bona traduko, sed por ni tro „teoria“.) Eksterĉielo kaj La Societo ĉe la Ora Pordego. (Strange malglata kaj komprenmanka lingvaĵo.) Tilululoi. La obskura homido. Morto. (Parte tro longaj, parte seninteresaj. La ĉarmo de la originalo certe estas en la stilo, kiun la traduko ne povis konservi, respektive ne povis trovi la esp. stilekvivalenton. Certe tre malfacila afero!) Okuloj de junaĝo. (Kun surprizo ni vidis ĝin en alia gazeto, ni devis ĝin malkompostigi.) La freneza batleno. (Vidu: La heredajo.) La spuglo de l' demono. La virino. Karikaturo en Australio. Anna Karenina. (Tro konata pro doni el ĝi fragmenton en nia malampleksa revuo.) La hontemuloj. (Ni petus eble ion alian de la sama aŭtoro.) Pirate (poemo. Ĝi montras ne ordinaraĵajn poetajn kapablojn, sed estas tro longa por sia temo. Eble fragmento aperos.) Anna Brigader. (Ĝi aperus, se ni ricevus ion el ŝia plumo. La samo ankaŭ pri) Karlis Kruhza. La kanto de l' upupo ktp.

Publikotaj: Rakonto de nubo. La pelikano. Printempo en la homo. A rebours. (Se permesate.) Lupo. La horloĝo. (Gorkij.) Kristnaska fabelo. (Siatempe.) Mia krimo. En luna nokto. La morto de l' piloto. Rakonto el la pratagoj. La platinringo. Henry Lawson. (Estus bone ricevi ion el lia plumo.) La festo de la mar-gutoj.

Pro nia mizera amplekso ni devas peti pri persista pacienco la sendintojn de la sekvantaj manuskriptoj: Metio. Historio de blanka merlo. Malsanaj perloj. La violono de l' cigano. Reĝido Marko en malliberejo.

Daŭrigo sekvos.

Ni petas niajn kunlaborantojn, ke ili, se ili ne povas sendi maŝinskribitan tekston, bonvolu skribi legeble. Precipe ni atentigas pri la diferenco inter la literoj *n* kaj *u*. Atentante pri ĝi oni ŝparas al la Redakta Komitato multan laboron.



AĈETU

JAPANAN BELAN PROPAN PENTRAĴON

pentritan per japanaj koloriloj sur silkkanvaso por helpo de mia studado!

PREZO: PO PECO 3 JENOJ JAPANAJ

Deziras ankau korespondi kun artistoj de tutmondo pri nova belarto precipe pentrarto per letero, produktoj, teknikajoj k. t. p.

KINNOSUKE FUJITA

japana pentristo

ĈE FUĴI HONDA OOMORI ARAĴUKU 1150
Tokio (Japanujo).

LEGU BONAJN VERKOJN:

<i>Madách</i> : La tragedio de l' homo (simpla) (luksa)	68.000 h-Kronoj 102.000 " "
(bibliofila, lede bindita, kun ora rando kaj surpriso, jam nur 15 ekzempleroj imponaj volumoj)	660.000 " "
simpla bindita	120.000 " "
luksa tole bind.	190.000 " "
<i>Jarkolektoj de L. M. binditaj kun ora surpriso 1922—23</i>	350.000 " "
1924	210.000 " "
<i>Dr. Vámbéry</i> : Kriminologio (El serio: „Kulturo kaj Scienco“.)	25.500 " "
<i>Karinthy</i> : Morgaŭ matene	17.000 " "

Al la prezoj aldonu poŝtelpezojn.

HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO
BUDAPEST, VI., EÖTVÖS-UTCA 3.

ALĜU AL U. E. A.

VI PAROLAS PRI CENTMILOJ DA ESPERANTISTOJ!

Provu, ke estas almenaŭ dekmil!

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

bezonas dekmil membrojn

CENTRA OFICEJO:

12, BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

ALVOKO POR KUNLABORADO!

Dr. Benson's Personal Mail Course Practical Esperanto bezonas helpontojn por plibonigi sian tre interesan kursolibron esperantan, kiu estos tradukita en aliajn lingvojn. Ĝi estos grava progresigo de Esperanto, do ĉiu esperantisto kunlaboru per sia ideo efektivi la planon de la sindona kaj ideala eldonanto. Interesiĝantoj por specimeno de la kursolibro kaj listo de bezonaĵoj, turnu sin tuj al

**BENSON SCHOOL OF ESPERANTO INC. 20
MERCER ST. NEWARK, N. J. USONO.**

ĈU VI VOLAS VOJAĜI AL ROMO POR 3000 HUGARAJ KRONOJ?

Ĉi tiu demando incitas nun ĉiun. La solvo ja estas ebla, ĉar la „Eldonkomitato de poŝtkartoj pri Sankta Jaro“ disvastigas artajn poŝtkartojn kun senpaga premi-slipeto en 3000 hungarkrona prezo. Ĉi tiuj premislipetoj estos lotumataj la 15-an de junio kaj

post ĉiu serio 10 personoj povos vojaĝi al Romo tute senpage

La gajnintoj rajtas partopreni kiun ajn pilgrimon senpage ĝis la fino de jaro 1925. Pri la akcio ĉie estas granda interesiĝo. La „Eldonkomitato de poŝtkartoj pri Sankta Jaro“ Budapeŝt, V., Honvéd-utca 10. — ĝis la serioj elĉerpigas — sendas minimume 10 pecojn kun antaŭ — aŭ poŝtpago. Mendinte pli ol 30 pecojn oni ne pagas poŝtelspezon. Al parohejoj, lernejoj ni sendas ankaŭ komisie la deziritan kvanton. Ĉiokaze estas dezirinde, ke ju pli multaj aĉetu poŝtkartojn, ĉar des pli multaj povos vojaĝi al Romo.

Szentévi Levelezőlapok Kiadóhivatala
Eldonkomitato de poŝtkartoj pri Sankta Jaro
Budapeŝt, V., Honvéd-utca 10. (Hungarujo.)



KIU ESTAS LA PLEJ BELA LIBRO EN ESPERANTO?

MADÁCH-KALOCSAY:

LA TRAGEDIO DE L'HOMO

laŭ la plimulto de voĉdonintoj pri nia enigmo. Konvinkigu kaj mendinte la verkon sendu vian opinion al

HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO
BUDAPEST, VI., EÖTVÖS-UTCA 3. SZÁM

Prezoj sen afranko:

Simpla: 63.000 Hung. Kr. Luksa: 102.000 Hung. Kr. Bibliofila: 660.000 Hung. Kr.

SOLVO